



MONATA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

LITERATURA SERIO

LIBERPENSA NUMERO

ENHAVO:

Kurt Hubricht: Esperanto inter la liberpensularo tutmonda. (Orig.) — *J. Burger*: Ne kredo — sed scio! Vers. (Orig.) — *Jak. Okunev*: Novhomoj. Rakonto. El la rusa trad. N. Inc. (259). — *Kastelano*: Risku pensi! Vers. (Orig.) — *Nikolao Rumjancev*: Pasko. Sciencartikolo. (Orig.) — *N. V. Nekrasov*: Limoj de l' Fantazio. Kritika skizo pri nova originala romano de Teo Jung. (Daŭrigo.) — *Léon Bergiers*: Literaturo kaj Epoko. — *Ernesto Drezen*: Historio de la Mondo-lingvo. (Tri jarcentoj da serĉado.) El la rusa lingvo trad. N. Hohlov. Generale redaktis N. Nekrasov. (5-a daŭrigo.)

Redakcio: 14, Avenue de Corbéra, Paris, XII-e (Francio)

Administracio: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Hodiaŭ nia numero estas ĉefe unutema: — liberpensa!

Tiu ĉi modesta paŝo restarigas la plej bonan malnovan tradicion de nia revuo — de tempo al tempo dediĉi apartajn numerojn al iu speciala temo. Tiu ĉi maniero montris sin tre sukcesa, — kaj nun, en la nova aranĝo, ni ne devas forlasi ĝin.

Tial ni vokas niajn kunlaborantojn partopreni en preparado de belliteratura materialo por sekvantaj temoj (de la venonta materialo dependos, kiu temo estos realigita plej frue):

- Fabrika laboro kaj urba vivo de la industria proletaro.
- La kamparanaro.
- La blanka teroro.
- La junularo (dezirinde facila porknaba legaĵo).
- Esperanto en la vivo laborista.
- Estonteco, nova socio, nova kulturo.

Proponu ankaŭ aliajn temojn.

Ne traduku, sed penu verki originale. Ni jam sufiĉe maturiĝis, por kapabli jam doni mem, anstataŭ pruntepreni.

Unu grava baro malhelpas al ni nun iomete, por ke ni malvolvigu plej larĝe la latentan provizon de nia vegetanta energio kaj povo, — ĝi estas la provizora mallarĝeco de l' amplekso de nia revuo. Sed ni sendube sukcesos konservi la 32-paĝecon de nia revuo, post kiam la valora verko "Historio de Mondolingvo" estos finpresita. Tiam la spaco duobliĝos kaj ni povos uzi pli multan materialon de aliaj kamaradoj, kiuj pacience atendas.

La sama kaŭzo malpermesas al ni enkonduki en nia revuo diversajn reformaĵojn kaj interalie la tre necesan ĝeneralan observon de la tuta novaperanta esperanto-literaturo (anstataŭ la ordinaraj preskaŭ sensignifaj recenzetoj). En tiu ĉi rilato estas tre demonstrativa la ne tro granda, kvankam sufiĉe detala, kritika skizo pri la ununura nova romano "Landoj de l' Fantazio", kiun ni estis devigitaj distiri por tri numeroj presataj dum duonjaro! Tiom malvasta estas nia laborkampo.

Tamen, la estonto estas nia!

La pripensita de ni plano por fundamenta rekonstruo de nia revuo restas aktuala kaj ĝi baldaŭ rapide trakreskos elinterne samkiel la nova verda herbo printempa post la fordegelinta blankmakula neĝo...



Esperanto inter la liberpensularo tutmonda

KURT HUBRICHT

Kvankam jam en 1906 dum la internacia kongreso de la liberpensuloj en Buenos-Aires oni estis akceptinta poresperantan rezolucion, tamen la liberpensula mondo ĝis fino de la mondmilito ignoris la mondhelpingvan demandon.

Por propagandi esperanton inter liberpensulaj rondoj, antaŭ la milito ekzistis la organizaĵo "Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj", kiu eldonis monatan gazeteton "Libera Penso". Pro la milito endormiĝis la nomita organizaĵo. Nur post la milito estis refondita la esperanta organizaĵo "Internacia Ligo de Liberpensuloj" kun la celo meti esperanton je la servo de la tutmonda liberpensularo. Oni ankaŭ ekeldonis dumonatan gazeteton "Liberpensulo". Pro financaj kaŭzoj la gazeto neregule aperadis kaj post kvarjara ekzisto la organizaĵo estis likvidita.

Tamen la laboroj de la liberpensaj esperantistoj estis sukcesplenaj. Per senlaca propagando la neesperantista liberpensularo komencis atenti esperanton kaj la esperanto-movadon. Kelkaj organizaĵoj subtenis la esperanto-movadon morale kaj finance. En diversaj liberpensulaj gazetoj aperis artikoloj pri kaj per esperanto kaj ankaŭ en la esperantolingvo; kelkaj publikigis eĉ tutan esperantokurson. Gvidantoj de la liberpensa mondo lernis la internacian helpingvan kaj nun la sekvantaj gazetoj portas la surprizon "Oni korespondas esperante": Le Matérialiste (Bruxelles), Bezbojnik (Moskvo), Der proletarische Freidenker (Essen), De Vrijdenker (Amsterdam), Bezvirnik (Ĥarkov), Der Freidenker (Vieno). La pola gazeto "Zycie Wolne" publikigas la liston de enhavo ankaŭ esperantolingve.

La unua internacia kongreso de la proletaj liberpensuloj (I. P. F. 1924 en Vieno) akceptis jenan rezolucion: "La unua kongreso de la proletaj liberpensuloj 1924 en Vieno pledas por la neceseco de internacia interkompreniĝlingvo (esperanto) pro praktikaj kaj idealaj kaŭzoj kaj energie subtenos ĉiujn tiurilatajn agojn."

La ĉefkunveno de la Liberpensula Asocio en Aŭstrio (1. kaj 2. de feb. 1925 en Leoben) akceptis jenan decidon: "Esperanto kiel proleta kulturmovado estas akceptata en la statutajn celojn de la asocio."

La kvina landkonferenco de la Pola Liberpensula Asocio akceptis ankaŭ poresperantan rezolucion: "La landkonferenco de la Pola Liberpensula Asocio konstatas, ke pro malekzisto de komuna internacia lingvo la interkompreniĝo inter la proletaro kaj per tio ankaŭ la kreo de internaciaj rilatoj malfaciliĝas. Ĝi decidas fari agojn; celante la enkondukon de esperanto en la lernejojn. La konferenco alvokas ĉiujn laboristajn organizaĵojn al propagando de esperanto kaj aranĝo de esperanto-kursoj.

La literaturo liberpensa en la esperantolingvo ne estas multnombra; tiu ĉi fakto estas komprenebla. Aperis multaj artikoloj liberpensaj en diversaj gazetoj, sed libroj kaj broŝuroj estas eldonitaj nur malmultaj. Mi citas la broŝurojn: "Krimoj de dio", "Kontraŭ dio", "Kio estas Monismo", "Kion vualas la biblio", Renan — "La vivo de Jesuo."

Hodiaŭ denove kolektiĝis la liberpensuloj-esperantistoj en la proleta esperanto-organizaĵo "Sennacieca Asocio Tutmonda", formante "Liberpensulan Sekcion". Ĝi aperigas ĉiumonate "Liberpensulan Paĝon" en la gazeto "Sennaciulo" kaj eldonas dusemajne Liberpensulan Gazetservon, kiu estas regule sendata al liberpensaj organizaĵoj kaj gazetoj. Dum la venonta kongreso de "Sennacieca Asocio Tutmonda" (Leipzig, 4.—10. de aŭgusto 1929) estas aranĝota fakkunsido de la liberpensuloj.

Estas ĝojiga fakto, ke la "Internacio de proletaj Liberpensuloj" (I. P. F.), kies rezolucion ni citas supre, emas al esperanto. La prezidanto de I. P. F., K-do prof. Hartvig, nun studas esperanton.

Do la eldiroj pravas, ke esperanto estas ŝatata kaj praktike uzata en la liberpensa mondo. Sed pripensu, ke niaj kontraŭuloj, starantaj sur alia barikado, ankaŭ tre bone uzas esperanton inter la aliaj bonaj bataliloj kaj eltrovaĵoj kiel ekz. filmo kaj radio. La katolikoj, kristanoj, spiritistoj, bibliostudentoj, teozofoj kaj aliaj sektanoj uzas vigle esperanton. Ili eldonas internaciajn esperantaj gazetojn, aranĝas internaciajn kongresojn, eldonas grandnombrajn esperanto-literaturon (eĉ la tuta biblio estas tradukita en esperanto), aranĝas diservojn esperantlingve. La nova japana religia movado Oomoto havas migrantajn propagandistojn, kiuj per helpo de esperanto disvastigas siajn ideojn en la tuta mondo.

Pro la vigla uzado de esperanto ĉe niaj kontraŭuloj oni povas konkludi, ke esperanto povus fariĝi danĝero por la libera penso, se ankaŭ ni ne uzus tiun ĉi internacian helplingvon.

Pli multe da liberpensa literaturo en esperanto!

Ne kredo — sed scio!

J. BURGER

<i>"Paskofesto, — jen la tago, Kiam Kristo savis nin!" — Diras pastroj al popolo. Nepensuloj kredas ĝin.</i>	<i>La rezulto de ĉi kredo: Luksa viv' por parazit', Sed por produktantaj homoj Vivo en mizer' kaj ŝvit'.</i>
--	--

<i>Kiu diras la fabelon Pri ĉi tia homa sav'? Nur trompistoj ĉiam sataj, Eble ankaŭ stulta sklav'.</i>	<i>Tial for la iluziojn, Ke nin savus religi', Ili ĉiuj senescepte Servas nur al reakci'!</i>
--	---

<i>Ili jam de du jarmiloj Kun la sama fanatik' Igas kredi je saviĝo En malhela mistifik'.</i>	<i>Ne la kredo, — sed scienco, Homraci', revoluci' Estas la saviloj, kiuj Gvidas nin al novsoci'!</i>
---	---



NOVHOMOJ

JAK. OKUNEV

Ĉar pastro Sergio estis novekleziano¹, li havis tonditajn kapharojn kaj barbon, hejme ĉe privatuloj li estis vestita per jako kaj bluaj pantalonoj, sed en violkoloran talaron li sin vestis nur tiam, kiam estis ironta el hejmo al la preĝejo aŭ pro aferoj. Li opiniis sin liberpensanta, rakontadis sarkasmajn anekdotojn pri pastraĉoj, vizitadis la popoldomon ĉe l' fabriko dum spektakloj kaj malkaŝe insultis episkopon, kiu estis defendanta la malnovan eklezion, nomante lin vulpo kaj monarĥistaĉo. En la vilaĝa preĝejo li faris diservon novforme, ŝatis fari predikojn, en kiuj nomis gemaljunulojn, plenigantajn la malvastan templon, civitanoj kaj kamaradoj.

En aprilmio, kiam printempe vojo kotigiĝis, el Moskvo venis la filino de pastro Sergio, Serafino. Ŝi dum du jaroj ne estis hejme, tamen veninte ekloĝis ne ĉe la patro, sed en la lernejo ĉe instruistino

¹ En 1921 dum la grandega malsato, post kiam en Sovetio la pastroj gvidataj de patriarko Tihon kontraŭbatalis eligon de oraĵoj kaj juveloj el preĝejoj por helpi la malsatantojn, la laboruloj tute ne volis plu fidi al la pastraĉoj kaj la dikredo rapide forflugis el multaj trompitaj kapoj. Tiam parto de pastraro ortodoksa faris ribelon kontraŭ Tihon, organizis "novan", "renovigitan" eklezion. La reformoj en komenco tuŝis eĉ domojn, sed precipe la reformoj rilatis al kulta ekstera flanko de religio kaj al ŝanĝoj en ŝtatuta (kanona) flanko: al pastroj estis permesita dufoje edziĝi vesti sin en neofica tempo civile ktp. Tamen plej rimarkinda estas la fakto, ke de tiam "noveklezio" organiziĝis laŭ demokrata principo, kvazaŭ simila al sovetaj organizaĵoj ekstere: ĉiuj eklezikomunumaj oficistoj estas elektataj, administrado estas nun kolegia ktp. Por kio? Por per ĉi tiu "demokratio" trompe konservi sub sia influo ankoraŭ kredantajn amasojn. Pri tia "novulo" temas en tiu ĉi rakonto, kaj pri alia novulo, vera kiu rompis ĉenojn de sia ekspluatista klaso kaj nun kontraŭbatalas ĝin. — Rim. de l' trad.

Vera Maksimovna. Pastro Sergio eksciis pri ŝia alveno nur duan tagon. Venis la lerneja gardisto Avdio kaj diris:

— Alvenis Serafima Sergievna, kun tonditaj haroj; ŝi kunhavas nur pakajeton malgrandan; ŝia vizaĝo aspektas verdkolora, ŝi estas treege malgrasa.

Pastro Sergio ekskuigis pro la ofendo, sed trankviligis sin kaj diris al la gardisto:

— Scias mi! Diru al Serafima Sergievna, ke mi tuj vizitos.

Li longe meditis, kiel al li decas iri al la filino, ĉu en la talaro, ĉu en la jako. Sur la strato decus resti en la talaro, sed montri sin al la filino li volus en la jako, novstile. Li metis sur sin freŝan ĉemizon kun blanka mola kolumo, zorgeme ĉirkaŭligis verdan kravaton, purigis per benzino la jakon, sed supre surmetis longabaskan pelton kvankam en la korto estis degelado: el-sub la pelto ne vidiĝis, ĉu li estas en la talaro, ĉu en la pantalono.

Serafima Sergievna efektive estis malgrasa kaj pala — sen sangoguteto en la vizaĝo. Nur sangoze purpuris la lipoj kaj brulis per severa, malvarma flameto la nigraj okuloj. Kun tonditaj haroj, maldika, en leda jako kaj mallonga jupo, ŝi aspektis kvazaŭ alivestiĝinta knabo, kaj ŝia voĉo estis preskaŭ knaba, akresona, decidoplena. Ŝi renkontis la patron malvarme, donis al li la manon, ne fleksinte manplaton: enŝovis sian malvarman maneton en lian manon kaj tuj elŝiris ĝin. Kaj kiam pastro Sergio disetendis la brakojn kaj tiris sin al la filino per la lipoj, ŝi lerte deflankiĝis, deiris al fenestro kaj de tie rigardis la patron per malvarmaj malamikecaj okuloj. Kiam li demetis la pelton kaj restis en la civila kostumo, ŝi iom movetis la brovojn kaj apenaŭ videble ekmoketis per randoj de la plenhelaj lipoj.

Pastro Sergio silentis, tamburante per la fingroj sur la tablo. Li ne sciis, pri kio decas paroli kun la filino, li timetis ŝin. Kaj por iel-maniere komenci parolon li diris:

— Venas la Pasko. Nunjare la pasko koincidas la unuamajan feston.

Ŝi nenion respondis kaj kiel antaŭe staris dorse al la fenestro, apoginte sin je subfenestra tabulo per la ambaŭ metitaj post si manoj, kaj rigardis la patron per fremdulaj okuloj.

Tiam pastro Sergio, kaŝante sian konfuziĝon kaj timon, ekparolis rapideme kaj raŭkante:

— Vane ci ne enloĝiĝis ĉe mi. En viaj superlernejoj oni opinias, ke ĉiuj pastraĉoj estas trompisto, kaj ci hontas, ke ci estas pastra filino. Sed oni devas rigardi la objektojn pli larĝe. La pastraro nun ne estas tia, kia ĝi estis, ni sampaŝe iras kun la soveta potenco. Jen mi, ekzemple, legas la verkojn de Lenin, en multo mi konsentas lin kaj opinias, ke ni devas servi al la popolo.

Li parolis longe, ekinsultis la episkopon kaj la malnovan tiĥonanan eklezion, ripetis al la filino enhavon de sia lasta prediko, en kiu

li argumentis, ke la kristanismo estas tiu sama komunismo, rakontis al ŝi, ke li partoprenas kluban laboron ĉe la fabriko, kie li organizis horon. Sed la filino silentis kaj daŭrigis rigardi lin per malamikecaj okuloj.

Li eksentis sin ĝenita, kvazaŭ antaŭ li estis malpleno. Li eksilentis kaj denove komencis tamburi per fingroj la tablon. Li ne sciis, kion fari: foriri li ne volis, kaj sidi sub la malamikeca rigardo de l' filino li timis.

— Senjo, — li diris, sentante, ke en la gorĝo pro nervemo, timemo kaj ofendo estas seke. — Mi vivas vidve kaj izolule. Ci estas mia sola. Ĉu venos ci al mi?

Ŝi skuis la tonditan kapon:

— Ne, ne venos mi. Mi ne havas ion fari ĉe vi.

Tiuj ĉi vortoj estis la unuaj, kiujn ŝi elparolis. Ŝia voĉo, seka kaj akresona, frapis pastron Sergion kiel vipo. Sur lia vizaĝo disfluis ruĝaj makuloj, li malfacile kaj ofte spiris. Tiuminute la ĉambron eniris Nikolao Nikolaeviĉ, malgranda, rondforma hometo, ĉeflibrotenanto de la fabriko kaj ties estinta posedanto. Li ne eniris, sed enruliĝis per siaj diketaj elastaj piedetoj kaj per plensona, grasa voĉeto ofteparolis:

— Saluton, Serafima Sergievna. Mi ja vin konas ankoraŭ jen tia —, li montris duonmetre de la planko kaj etendis al ŝi la manon.

Ŝi salutis lin tiel same kiel la patron, malvarme kaj malamikece. Kaj daŭrigis staradon ĉe la fenestro, frapetante per kalkanumo la plankon malpacience. Sed subite ŝi ekridis per seka kaj kolera ridmoko kaj diris:

— Certe, mi memoras, Nikolao Nikolaeviĉ. Nun en la brikdomo ĉe la fabriko, en kiu vi loĝis vintre, troviĝas klubo. Kiam vi estis mastro, ne librotenanto, vi somere loĝis en eksterlando, kaj aŭtune, kiam vi estis reveninta, la patro faris dankdiservon en via salono, kantis ĥoro, kaj vespere vi aranĝis vespermanĝon, por kiu vi invitis la patron, diakonon, instruiston kaj policedron. Mi memoras, ke la patro nomadis la policedron "ci", kaj vi malsobrigis ilin ambaŭ, kaj ambaŭ ili flatis vin. Kaj unufoje, kiam en la fabriko estis preparata striko, vi petis la patron, ke li faru admonan parolon al la laboristoj, sed kiam la "parolo" ne helpis, vi postulis, ke la policedro alvoku telegrame la kozakojn el la urbo. Mi memoras, kiel la kozakoj pafis laboristojn, kiel estis mortigita Matveev, maljuna teksisto, kiel la patro entombigis lin mese kaj kiel poste, kiam la ekscitiĝo estis "kvietigita", la patro pro via peto faris dankmeson en via salono. Post la dankmeso, mi memoras, estis la vespermanĝo, oni drinkis vinon, kaj mi unufoje en la vivo provis ĉampanvinon. Ho, jes, mi ĉion memoras.

Ŝi estis elĵetanta tiujn ĉi vortojn kolere kaj varmege kaj, tut-fininte, turnis sin al la fenestro, dorsestarante kontraŭ la gastoj, kiuj silente rigardis unu la alian. Kaj, kovrita per malvarma ŝvitajo,

tremanta, sin levis pastro Sergio, surmetis la pelton kaj iris al la pordo, balbutante:

— Mi ankoraŭ venos al ci, Senjo, mi klarigos.

Dum la nokto kaj ambaŭ sekvintaj noktoj pastro Sergio dormis malbone. Li domaĝis, ke la filino estas fremda al li, ke ŝi malhonorigas lin antaŭ la laboristvilaĝo, loĝante ĉe la instruistino, sed ne hejme. Li timis eliri en la straton, por ke lin oni ne demandu pri tio kaj sidis hejme, tuttage paŝante tra la ĉambro kaj pensante pri sia ofendo. Nur antaŭ matena diservo li kvietigis kaj iris diservi en la preĝejon, en kiu estis malvaste kaj sufoke pro troplenigitaj ĝin kampanoj el la ĉirkaŭaĵo. Odoris vakso, ŝaffelo¹, homŝvito kaj timiano. Pastro Sergio kutimiĝis al tiu odoro kaj ĝojis, ke en la preĝejo estas multaj homoj. Kvankam li estis laca kaj malsana pro la sendormaj noktoj, tamen li diservis vigle, verve, kaj reveninte hejmen matene post la diservo enprofundiĝis fortan sanan dormon.

La mateno leviĝis sunbrila kaj gaja. De la tegmentoj sonoris degelgutado, odoris degelinta grundo. Pastro Sergio, satdorminte, eliris en la straton. Sur la placo, kontraŭ la lernejo, nigris grandega popolamaso. Ĝi plenigis tutan placon, hele koloriginte ĝin per sangkoloraj standardaj tolaĵoj. Supre super la amaso, sur la dekorita de ruĝstofto tribuno staris fraŭlino, havanta kvazaŭ knaban maldikan korpon, en leda jako kaj svingetante la tonditan kapon, ĵetadis sonorajn manplenojn da vortoj en la homamason.

Pastro Sergio rekonis la filinon kaj traŝovis sin pli proksime al la tribuno. Li vidis ŝiajn okulojn. Ili brulis. Sed ili estis ne tiuj flamoj, kiujn li vidis tiam en la lernejo. Ĝi estis varmega flamo, venanta el ŝia animo. Komence pastro Sergio vidis nur ĉi tiun flamon kaj aŭskultis atente la vortojn. Subite lin io kvazaŭ mordpikis dolore. Li ekaŭdis sian nomon, prononcitan de la filino kun pasia malamo:

— Vi memoras, gekamaradoj, kiel pastro Sergio faris dankdiservon en la mastrodomo pro la “kvietigo” de la striko, post la entombigo de la teksisto Matveev. Kaj nun li ŝajnis sin malamiko de la kapitalistoj kaj kiel ĉiuj novekleziuloj, kiuj volas servi al la nova mastro — al vi, por trompi vin, li kredigas vin, ke la religio servas al la ekspluatata klaso...

Pastro Sergio fermetis la okulojn, kvazaŭ oni lin batis sur la kapo per hakildorso, kaj komencis elŝovi sin el la homamaso. Io lin balancis de flanko al flanko, li malfortigis kaj ne sentis sub si la teron, kvazaŭ liaj piedoj estis vataj. Trafinte en vastaĵon, li profunde enspiris kaj iris per neĝusta paŝo al preĝeja ĉirkaŭbarilo, kie jam nigris grupeto da gemaljunuloj kaj kampanoj. Apud la pordegoj li ekvidis la sonorigiston kaj atakis lin:

— Kial do vi staras? Oni devas sonorigi! Sonorigu pli laŭte, ne kompatu la sonorilojn, Feodoro Petroviĉ! Sonorigu!

Elrusigis N. I n c. (259).

¹ Rusaj kampanoj vintre vestas sin per “tulup-oj” kaj duonpeltoj (“poluŝubki”), preparitaj el kruda ŝafa felo. — Rim. de l' trad.

Risku pensi?

KASTELANO

*Kial do por vi, proletoj,
Ĉiam zorgoj kaj suer'
Kaj por viaj infanetoj
Vivo kvazaŭ en infer'?*

*Do nur tial, ĉar vi restas
Stulta nepripensemul'
Kaj sopiroj viaj estas
Ĉium en ĉielnebul'.*

*Kial do la luksa stato
Por malmultaj en la mond'
Kaj por multaj la malsato
En la sama homa rond'?*

*Kaŭzo estas via kredo
Kaj — ke vi ne pensas mem;
Vi esperas per la ĉedo
“Dian” savon el dilem'.*

*Ne — ho karaj kamaradoj,
Vi neniam el mizer'
Povas veni per helpadoj
De aliaj al liber'.*

*Nur sin mem per forta volo
Savi povas proletar', —
— Risku pensi — vi — popolo!
Baldaŭ sekvos liberjar'.*



PASKO

NIKOLAO RUMJANCEV¹

Inter multaj ekleziaj kaj moraraj kristanaj festoj plej ĉefa estas la Pasko. Per longa fasto la eklezio preparas al ĝi kredantojn, por festado destinante tutan semajnon, nomante ĝin la plejfestoj, lasante efiki ĉiujn siajn rimedojn por aspektigi ĝin plej solena, plej alloga kaj tielmaniere konservi por ĝi ŝatindan lokon en popola moraro. Ĉio ĉi devigas nin prikonsideri la feston, rigardi, kiaj estas ties esenco, historio kaj signifo.

Evangeliaj fabeloj

La eklezio per buŝoj de la sutanuloj instruas, ke la pasko kvazaŭ estis fondita por rememoro pri martira morto kaj glora reviviĝo de Jesuo Kristo, priskribitaj en la evangelioj. Ĝi estas malvero, ĉar la historia scienco nun jam pruvis, ke Jesuo kiel homo, kiel reala persono neniam ekzistis, li estas mita figuro, kaj ke ĉiuj evangeliaj legendoj pri li estas plenaj je absurdaĵoj, aspektas kiel fikтивaj historiaĵoj, religiaj fabeloj. Por montri tion ni menciuj kelkajn ekzemplojn, ligitajn kun la fiktiva aresto, juĝo kaj mortpuno de Jesuo.

Laŭ la evangelioj Jesuo estis arestita en paska nokto de la hebrea pastroj kaj iliaj armitaj servantoj, dum tiu sama nokto li estis juĝata de du ĉefpastroj en la domo de unu el ili, li estis kondamnita al mortigo, estis poste transdonita matene al la roma vicreĝo Pilato, de tiu lasta li estis deklarita kiel senkulpa kaj spite ĉio estis krucumita ĝuste paskotage.

Ĉi-tie estas ĉio absurda, malvera. Antaŭ ĉio estas absurda ĉi tie la priskribo de l' Jesua aresto, ĉar la religia leĝo malpermesis al la hebreaĵoj kaj iliaj servantoj porti armilojn kaj fari iujn ajn laikajn aferojn antaŭ pasko

¹ La aŭtoro estas konata en Sovetio verkisto-ateisto, propagandanta la astran teorion pri deveno de religio, specialisto pri deveno de kristanaj festoj.

mem. Krom tio, laŭ la sama leĝo estis malpermesata aranĝi juĝon dum noktoj kaj en privata domo, tiom pli dum "sankta" paska nokto kaj en domo de ĉefpastro. Krome, neniuokaze ĉe la hebreoj povus samtempe ekzisti du ĉefpastroj, kaj tiu ĉi en la epoko de la roma regado ne rajtis juĝi pri kriminalaj krimoj kaj mortpuni iun ajn.

La tiama Pilato, despoto, malaminta la hebreojn, neniuokaze krucumigus Jesuon, se li konsiderus ĉi tiun senkulpa; krom tio li loĝis kutime ĉiam ne en Jerusalemo, sed en alia urbo — Kesario. Fine, ankaŭ malvera estas la priskribo de la krucumado. La lasta estis kutime efektiva: sur la ekzekutloko prepare estis enfosigata lignokolono, la ekzekutoto estis alkondukata al ĝi, per ŝnuro li estis tirata al supro kaj alligata per ĝi aŭ per ĉenoj. Do, la krucon, en speco pentrata sur krucifikoj, ikonoj kaj bildoj, oni tiam ne uzis, la kondamnito ĝin ne portis, sed simple estis alligata al kolono, sed ne estis najligata.

Pro malsufiĉo de loko ni ne menciuj aliajn similiajn absurdaĵojn en la evangeliaj legendoj pri lastaj momentoj de la vivo kaj "historio" Jesua, nur ni diru, ke, se li neniam ekzistis, sur la tero ne vivis: sekve ne okazis lia morto ankaŭ, tiom pli la reviviĝo, kaj ili ne povis esti bazo por la kristana pasko. Ties deveno estas tute alia: ĝi en sia komenco rezultigis kiel koincido de du printempaj festoj — antikva hebrea pasko kaj orientdolana festo de "morto kaj reviviĝo" de kreskaĵdio, nomata de egiptoj Oziriso, de fenicoj Adoniso, de frigoj Atiso, de babilonanoj Tamuzo, de grekoj Dionizio k. a.

Deveno de la Pasko

La unuaj kristanoj, hebreoj laŭ deveno, festis tradicie la kutiman antikvehebrean feston Pasko, ligitan kun printempaj ritoj kaj zorgoj pri brutaro kaj kun ekrikolto de la hordeo, kiu maturiĝas en Palestino unua el ĉiuj grenoj. Pli poste, kiam plimultenombriĝis la kristanoj el "idolkultanoj", la lastaj komencis kunigi ĉi tiun Paskon kun sia printempa festo, ligitan kun rapidega kresko de vegetaĵaro, grenaro printempe. Tiu festo ilia estis multtaga kaj konsistis el tuta ritaro je memoro, kvazaŭ pri morto kaj reviviĝo de ilia "savanto"-dio.

La unuaj festotagoj havis malgajan karakteron: oni malgajis pri la mortinto, en temploj estis metata meze ĉerko kun imago-statuo de l' dio kaj estis farata funebra meso, akompanata per fasto kaj seksa abstinenco. En tria tago post tio oni aranĝadis gajan festenon okaze de reviviĝo de l' mortinta "savinto". En vespero la meso havis malĝojan, malgajan karakteron; ĝuste en meznokto la aspekto estis tute aliĝanta: la templo estis ĉirkaŭlumigata, la pontifiko aperadis en brilaj ornatotaj kaj solene deklaris ke la dio reviviĝis post tritaga restado en la ĉerko. La malĝojon sekvis nebridita ĝojo, la kredantoj gratuladis unu la alian kaj festenis dum kelkaj tagoj.

Ĉi tiu orient-idolana festo estis aranĝata okaze de printempa rekresko de la vegetaĵaro (aliloke — pro rikoltkomenco), kaj en ties ritoj sub homformo estis prezentata la grenvivo, la sorto de l' greno, tiu ĉefa nutraĵo por la homo. La morto, enterigo kaj reviviĝo de ties dio — ĝi estas alegorio de l' greno, semita — "enterigita" — en la teron kaj reviviĝinta sub speco de juna verdaĵo kaj, poste, sub speco de maturaj, plenaj spikoj. Se ni imagus, kiom gravan signifon havis kaj havas por la homvivo la greno kaj la rikolto, garantianta la homon per ĉi tiu greno, ni facile komprenus, kial la antikva

agrikulturisto faris la printempon sia plej gaja festo kaj kial la sortojn de l' greno li prezentis en ritoj kaj legendoj-mitoj sub formo de vivo, morto kaj reviviĝo de dio.

Jen ĉi tiun sian agrikulturan feston la kristanoj el "idolanoj" kunigis kun antikvehebrea pasko kaj rezulte kreis kvazaŭ novan feston — la kristanan paskon, preninte ritan enhavon por ĝi el ambaŭ — hebrea kaj idolana festoj kaj ligitaj ĝin kun sia, neniam en realo ekzistinta Jesuo.

Malnovmoraj postrestaĵoj

En procedo de l' kristaniĝo de la slavaj, germanaj kaj aliaj popoloj en la meza kaj norda Eŭropo la miksitaj hebre-orientdolana, kristana pasko kunigis ĉi tie kun lokaj antikvaj slav-germanaj idolanaj printempaj festoj kaj prenis de ili tutan serion da novaj elementoj, konservataj en ĝi ĝis nun sub formo de jam moraraj postrestaĵoj.

Komencante sian mastruman, produktadan jaron printempe, la antikvaj slavoj kaj germanoj kunvenadis, ĉiuj en sia lando, por multehomaj kaj multetaga komunum-kunvenoj. Dum ĉi tiuj kunvenoj ili kune distribuadis la terparcelojn por semado, por paŝtado, ĉasado, mielkolektado k. s., disdonadis inter si laborojn, juĝis kaj prikonsideris aliajn siajn aktualajn problemojn. La kunvenoj estis akompanataj per kuna komunuma festeno kiel pro ĝoja renkonto kaj baldaŭ nova adiaŭo, tial ankaŭ por akumuli fortojn antaŭ venantaj malfacilaj printempaj kaj someraj laboroj, por kio ĉiu alportis, kion li povis.

Krom tiuj ĉi celoj la festeno havis ankaŭ aliajn. Ekzemple, ĉiuj alportataj por ĝi produktoj tie, dum la kunveno, antaŭzorge estis "inaŭgurataj", super ili estis farataj kelkiuj magiaj ritoj, celintaj magie influi rikolton de grenoj, herboj, fruktoj, naskotaron de hejmbestoj, plimultiĝon de fiŝoj, ĉasajoj ktp.

Samtempe niaj praaŭoj opiniis, ke en la periodo de tiu ĉi festo, printempe, sur la teron eliras animoj de la mortintaj samgentanoj kaj "koleraj" spiritoj, demonoj. La unuajn oni devas favorigi, bonfarigi por ke ili helpu la vivantojn en iliaj laboroj; la duajn oni devas ielmaniere forpeli, fortimigi, liberigi de ili. Ĝi estis ankaŭ unu el celoj de l' pritraktata festa kunveno kaj festeno de l' antikvaj slavoj kaj germanoj.

Do, la printempa festo estis multeflanke karakteriza kaj havis riĉan enhavon. Kun ĝi fakte kunigis la elportita de l' Oriento kaj Sudo Kristana Pasko, el ĝi efektive la Pasko ĉerpis multajn novajn apartajn elementojn.

En la epoko de la slava-germana "idolaneco", pro malprogresema agrikultura kaj alia tekniko la aŭtunaj provizoj da greno kaj aliaj produktoj sufiĉis ne porlonge kaj de post la vintromezo estis komenciĝanta la devigita longedaŭra "fasto". Je la printempo komencadis kovi la kokinoj, kaj ties ovoĵo ĉe tiaj cirkonstancoj estis dezirinda kaj eĉ franda nutraĵo. Tial ne estas mireble, ke oni ilin konservadis por la printempa festo, dum kiu ili havis rimarkindan signifon inter la festenaj manĝaĵoj: oni ilin manĝis multkvante, ilin donacadis renkontiĝante unu la alian kaj adiaŭante, per ili oni regaladis unu la alian.

Por regali per ili ankaŭ la animojn de mortintoj, kies plej ŝatata nutraĵo estis la sango, oni ĉirkaŭŝmiris la ovojn, kolorigis ilin per la sango ruĝkoloro. Poste la senco de tia kolorigo estis forgesita, kaj oni kolorigis la ovojn simple por ornamo diverskolora. El tio devenas la paska rito, prepari kaj donaci de unu al la alia la kolorigitajn ovojn.

Vintre la grenprovizoj ĉe la antikvaj slavoj kaj germanoj, kiel estis dirite, estis konsumitaj, kaj nur por la nomita festo speciale estis konservata kelkiom da greno aŭ faruno, el kiu jam tiam oni bakis panetojn, same post la vintra duonmalsatado konsideratajn kiel frandaĵo. Oni bakis ilin por interregalo kaj por plifortikigo de la fortoj, ankaŭ por magiaj celoj: per magiaj ritoj super ili oni penis garantiĝi bonrikolton de la grenoj, fruktodonemon de la grundo. Ties postrestaĵo konserviĝis en la paska rito baki specialajn panojn.

Alia nepra manĝaĵo de la printempa festo de l' antikvuloj, ankaŭ trafinta pli poste sur la paskan tablon de niaj kreduloj, estis la apraj femuroj, velkigitaj, fumajitaj aŭ peklitaj, ĉar ili tiuspece povis plej facile kaj plej longedaŭre konserviĝi. Nome la apraj, ĉar buĉi laborbruton la malriĉa pro ties manko antikva kamparano ne povis, sed la sovaĝaj aproj vivis multaj en la kovrita per virgaj arbaroj meza kaj norda Eŭropo, ili estis facile buĉeblaj, kaj ties karno estis satiga kaj bonnutra, fortikiganta la fortojn. Kiam poste per malsovaĝigo kaj hejmalkutimigo el la aproj fariĝis la porkoj, la aprofemurojn oni komencis anstataŭi ĝi per la porkaj, per la ŝinko.

Se ni aldonu al ĉio ĉi ankoraŭ uzatajn ĝis nun iuloke kazeaĵojn, ankaŭ diversajn alkoholaĵojn, ni ricevos ĉion ĉefan, per kio sin regaladis la slavoj kaj germanoj dum sia printempa festo, per kio ili havigis al si fortojn por venontaj laboroj kaj penis magie garantiĝi al si mastruman bonstaton kaj kio jam sub formo de moraraj postrestaĵoj konserviĝis ĝis nun sur la paska tablo de niaj kreduloj.

Kunvenante por sia komunuma kunveno kaj festeno, niaj praavoj uzis okazon kaj aranĝis tiam sian komercon, vendadon kaj interŝanĝon de siaj produktoj kaj faritaĵoj. Ties postrestaĵo nun estas la antaŭpaska vigla bazarvendado apud la temploj kaj monaĥejoj, same kiel pli frue apud enteriglokoj, kie kvazaŭ pli volonte ĉeestas la animoj de mortintoj.

La aliiĝintaj sociaj kondiĉoj kaj la kristana eklezio nuligis la riton de la kuna printempa festeno de kolektiva raciono kaj de regalado al mortintoj, sed la postrestaĵo de ĉio ĉi konserviĝis en la paskaj kutimaj kumporti la ĉefajn produktojn en preĝejon por "sanktigi", regali sin en la hejmoj, viziti unu la alian gaste, kaj ankaŭ porti la produktojn sur tombojn por regali mortintojn. Por tiu ĉi celo kelkaj kredantoj dum tuta pasksemajno konservas sian tablon pretigita kun ĉiuj manĝaĵoj kaj ne fermas por nokto fenestrojn kaj pordojn, por ke la animoj de mortintaj parencoj povu en ajna tempo veni domon kaj regali sin.

Regalante, favorigante siajn mortintojn, niaj antaŭuloj dum la festo samtempe penis liberiĝi de malbonaj spiritoj, demonoj, idoj de malhelo, mallumo. Ili opiniis, ke la demonoj timas bruadon, irapadon, fajron kaj lumon, forkuras, aŭdinte aŭ vidinte tion. En tio trovas sian klarigon la paskaj kutimoj aranĝi surdigan sonorilaran sonoradon, lumigi en preĝejoj multajn kandelojn kaj lampionojn, ilumini, ĵeti raketojn kaj fajraĵojn, uzi krakilojn kaj eksplodiletojn, paŝi el paŝiloj kaj kanonoj.

Limigante nin per ĉi tiuj momentoj kaj resumante, ni vidas, ke la figurantaj ĝis nun en popola moraro kaj parte en eklezia praktiko diversaj paskaj elementoj estas postrestaĵoj de l' antikva moraro kaj de la antikva slava-germana "idolana" printempa festo okaze de komenco produktadara kaj printempaj kaj someraj laboroj.

Pasko kaj la 1-a de majo

Do la pasko en sia nuntempa aspekto rezultas el kuniĝo de l' antikva hebrea pasko, antikvorianta "idolana" printempa agrikultura festo kun la sama pli posta festo de la slavoj kaj germanoj. Kuniĝanta dum jarmiloj, elkreskinta sur la bazo de teknika malprogresemo, mastruma senhelpeco kaj kultura malklereco de l' antikvuloj kaj preskaŭ tute konsistanta el postrestaĵoj de ĉio ĉi, ĝi kiel ĉiu eklezia kaj malnovmorara festo estas absurda kaj malutila.

Ties malutilo estas en tio, ke por ĝi la malkleraj, neprogresintaj laboristamasoj elspezas ofte siajn lastajn provizojn kaj monon, malproduktive eluzas grandegajn rimedojn, treege bezonataj por mastrumo kaj kulturaj celoj. Krom tio la paskaj malmoderaĵoj kaj diboĉado rezultigas malfortigon de la popolaj sano kaj fortoj, senbridigon de malnoblaj instinktoj, kreskon de l' arogantismo, tranĉilbatado, mallongedire — ĝeneralan malaltigon de l' popola kulturnivelo. Sed ĝi estas nur unu flanko de l' afero, ekzistas la alia, la plej grava, politika.

En la solenaj teatrecaj cirkonstancoj, inter orkolora ikonbrilo, lumo de kandeloj kaj lampionoj, inter nuboj de daturiganta timian-incenso, sub surdiganta sonorado la pastraro en siaj paskaj preĝoj, kantoj, legoj kaj predikoj jam dum multaj jarcentoj ĉiam predikas al vastaj prirabitaj laboramasoj sklavan obeemon al sorto, blindan esperon je helpo de supre, de mita "difilo" — Jesuo, kiu kvazaŭ speciale venis sur la teron, suferis ĉi tie, martire mortis pro homoj, reviviĝis kaj ĉieleniris garantiinte al ili per sia morto postmortan feliĉon, ripozon post la surteraj turmentoj kaj suferoj.

Ĉi tiu prediko permesas al la klaso de kapitalistoj kaj ties servantoj — parazitaj pastraroj teni en siaj manoj kaj ekspluati la malklerajn laborulamasojn, malheligi ilian klaskoncion, malfortigi ilian volon kaj fortojn en la batalo kontraŭ la mondkapitalo ktp. Anstataŭ la vigliganta alvoko al krea libera laboro kaj al batalo por kreado de pli bona vivo ĉi tie, sur la tero, — dum la pasko estas aŭdata la malmoraliganta alvoko al senprotesta, pasiva humileco kaj sufero kaj promesoj de feliĉo postmorta "en ĉielo". Ĉio ĉi simile al venenaĵo putrigante efikas la popolan organison, paralizas ĝin kaj duoble malutila faras la paskon.

La pasko estas ilo en la manoj de l' parazitaj klasoj. Por la proletario, laboranta kamparano kaj laboranta intelektularo ĝi ne estas bezona, por ili ĝi estas malutila en ekonomia, kultura kaj politika rilatoj. Ĝi devas esti forĵetita, forbalaita per fera balaŭdo el nia vivkutimaro, kaj al ĝi ni devas kontraŭmeti nian revolucionan feston de l' klasa solidareco kaj revolucia batalo de l' tutmonda laborularo — nian ruĝan 1-an de majo!

1 La aŭtoro por siaj sciencaj laboroj pri deveno de kristanaj festoj de sanktulkultoj, religioj, ikonoj ktp. tre bezonas eksterversetiajn sciencajn kaj ekleziajn librojn, gazetojn, flugfoliojn priskribantajn tiujn ĉi festojn kaj "sanktaĵojn" ankaŭ estas bezonataj konformaj albumoj, ilustraĵoj, afiŝoj, poŝtkartoj ilustr., fotoĵoj ktp. Pro sendo de materialoj (en ĉiuj eŭropaj lingvoj) la aŭtoro estus tre dankema al eksterlandaj Kamaradoj. Krom tio li volonte korespondos pri antireligiaj temoj. Ĉion sendu laŭ la adreso: Sovetio, Moskvo, Granatnij per., 1 — "Ateisto", al N. Rumjancev.

LIMOJ DE L' FANTAZIO

Kritika skizo pri nova originala romano de Teo Jung

N. V. NEKRASOV

(Daŭrigo)

Por elĉerpi pli-malpli plene la sociologian analizon de la elpensita de Teo Jung utopia ŝtato Raspaza, ni tuŝu iomete ankaŭ ĝian historion, kiel ĝi estas rakontita de la aŭtoro.

Jen ĝi estas tre mallonge:

La maljunulo rakontis al li (al Bill Moller. N. N.), ke ĝis antaŭ kelkaj jarcentoj la loĝantaro de tiu ĉi lando estis dividita je diversaj gentoj kun malsamaj idiomoj. Ili estis regataj de parte tre batalemaĵaj princoj, kaj ili ofte militis unu kontraŭ la alia.

Kial ili estis tiel militemaj, pro kiuj kaŭzoj (ĉu nur por propra plezuro?), la aŭtoro nenion diras al ni.

... La bataloj estis longedaŭraj kaj akraj; sed fine — tio okazis antaŭ tri jarcentoj — iu princo de Raspaza sukcesis venki ĉiujn aliajn kaj devigis ilin akcepti lin kiel superan reganton. (Pg. 81.)

Jen ni vidas bonegan manieron por atingi plej rapide la universalan mondunuecon politikan, al kiu ni ĉiuj aspiras plej entuziasme: al militi la tutan mondon kaj perforte subigi ĝin al si! Evidentiĝas ke la imperialismo de la grandaj potencoj tute ne estas tiel malbona, ĉu ne?

Tiu beninda princo havis la nomon Rothos e Rom (t. e. Rothos la Granda). Sed ekzistis ankaŭ alia beninda princo Rothos e Hoga (t. e. Rothos la Pia), kiu feliĉigis sian regataron per unueca religio. Jen estas la absurdaj principoj de tiu originala religio, kiuj estas tamen tre karakterizaj por ĉiu religio:

Laŭ la tradicio antaŭ multaj, multaj jarcentoj, kiam la nunaj loĝantoj de la regno venis en tiun ĉi landon ili kredis je multaj dioj, kiuj regis en ĉielo kaj sur tero. Sed naskiĝis el la popolo granda sanktulo, kiu jam en junula aĝo loĝiĝis en la sovaĝejon "Kraŭs" kaj tie vivadis kiel ermito. Tie en mondforeco kaj profunda soleco li interparoladis kun la Granda Spirito de l' Mondo. kiu lin inspiris, tiel ke li ekkonis la plej grandajn enigmojn, la plej kaŝitajn veraĵojn. (Pg. 84.)

Nebuloza sitelo da plej enigmasenca mistiko estas elverŝata sur la leganton. "Interparoladi kun (la?) Granda Spirito (!?) en profunda soleco (!)" — kiom mistere kaj respektinde! Kiamaniere? Sed ja ĉiu religio nutras siajn adeptojn per tiu ĉi fantazia ventroparolado.

Tamen ni legu plue pri la "sanktulo":

Li instruis, ke la tutan mondo regas nur unu dio*, nur unu granda spirito*, unu viviganto* de l' tuto*, sed ke tiu unu* tamen estas entenata en ĉiu unuopa estaĵo, ke ĉiu el tiuj estaĵoj do estas parto de tiu granda* dio*, estas mem io dia*, eĉ mem dio*. Ke tio dia* en ĉiu estaĵo estas eterna kiel la granda* spirito* mem. Ke ĉe la t. n. "morto" nur la materio dissolviĝas por renaskiĝi ĉiam novan estaĵon, kiun denove vivigos la dio*. Ke en dio* estas entenataj du energioj: unu kreanta kaj unu detruanta. Ke la unuan oni nomas la lumspirita, la suna, la vere dia, kaj la duan la demona, la nokta. Ke tiuj energioj de eterne luktas unu kontraŭ la alia, sed ke la lumspirita la suna la vere dia, estas la venkonta, la ĉiam pli potenta, ĝis — iun tagon — la lumo superradios la tutan mondon kaj tute forpelos la mallumon. (Pg. 84—85.)

Ni vidas do tie ĉi la plej banalan eksponon de la sensenca kaj sensenca "pan"-religia "principaro", sed ja kiom ĉio ĵus dirita estas karakter-

* Ĉiuj ĉi vortoj en la originalo komenciĝas per grandliteroj, verŝajne por montri ilian signifon en iu speciala mistika senco. Sed ni ne opinias ke tio estas necesa: tro multe da honoro! N. N.

LITERATURO KAJ EPOKO

LÉON BERGIERS

Ĉiu epoko estis influita de la siatempa literaturo. Fakte ĉu oni povos nei la influon de Zola sur la lastan duonjarcenton? Same la literaturo tre intense influas la verkistojn. La situacio turmentita de Rusio iama kreis Dostojevski'on... La milito de 1914 konigis Barbusse'on. La verkistoj, kiuj scias preterpasi sian epokon, estas tre meritantoj. Tro multaj verkistoj konservas, kiel Barbusse, la potencan postsignon de sia epoko. La genio de Barbusse naskiĝis en la sango, en la malamo. Lia verko "Le Feu" (La Fajro) estas majstra. Sed oni retrovas ĉe tiu fama revoluciemulo la saman pasivecon, kiu taŭgis al la mortintaj generacioj, dormantaj en la senfareco kaj kiujn oni devis skuegi montrante ilian situacion per koloroj malhelaj. Kaj oni povas timi, ke Barbusse ne scias antaŭeniri. Milito finiĝis, alia milito pli grava okazas, tiu de la proletariato kontraŭ la kapitalismo. Kaj ĉu utilus al tiu batalanta laboristaro la legado de verkoj de la speco "Germinal"? Kia estas "Germinal"? Ĉefverko, sed ĉefverko de la lasta jarcento. La striko trafas malvenkon; la popolo estas venkita. Ĉu oni devas puŝi al la batalo, nur parolante pri malvenko? Ne, la laboristaro sopiras al venko, kaj necesas paroli pri venko.

La nuntempa literaturo ne taŭgas al la batalo. En la historio de la Literaturo kaj de la Popoloj, tiuj turniĝoj ofte estis malfacile preterpasitaj. Kaj tiuj, kiuj celis la Vojon, respondantan al la Ideo konsciata aŭ subkonsciata de la amaso estis geniuloj.

Ekzistas multaj kialoj: Shakespeare, Goethe, Dickens, Balzac, Heine, Molière, Ibsen, Voltaire, Rousseau, Hugo, Dostojevski, Tolstoj, Tagore, Gandhi, Zola, De Coster ktp...

Sed pro kio tiuj homoj estas gigantoj de la literaturo? Simpla respondo: ili liberiĝis el la tradicio, ili ne verkis kiel la aliaj. Ili sentis, ke ĉiu epoko bezonas propran literaturon. Kaj tiu literaturo

iza por ĉiu religio, ĉu kristana, ĉu mahometana, ĉu budhista, ĉu iu ajn alia. La plej sankta sinjoro Onisabro Deguĉi same kiel Baha'u'llah aŭ papo Pius la mil naŭcent dudek naŭa — ĉiuj ili senescepte subskribas la cititajn sentencojn per ĉiuj siaj manoj kaj piedoj.

Tiel ĉi estas "solvita" la religia unuigo de la Raspaza-anaro...

Konklude, la historio de Raspaza estas prezentita en la romano tia-maniere, ke ni nenion vidas en ĝi krom nekomprenblaj arbitraj de kelkaj princoj kaj malsaĝaj "sanktuloj". La vivo de la popolo, la evoluado de la klasoj, la ekonomia progreso, — unuvorte ĉio, kio devas esti la vera historio, — restas tute nekonata al ni. (Finota.)

devas ne naskiĝi kun la epoko, sed antaŭ la epoko. La literaturo devas esti anoncanta. Kion signifus literaturo, alvokanta al revolucio post la revolucio? Sed hodiaŭ ne ankoraŭ okazas la tutmonda revolucio, kaj en la animo de la sentantaj poetoj tiu revolucio nepre jam okaziĝas. La verkistoj devas esti la profetoj de la revolucio, kaj ne ĝiaj priskribantoj, ili devas anonci "la Teron Promesitan". Kaj kiam fakte la revolucio fariĝos, tiam la plumo de aliaj novan literaturon nasku, literaturon edukantan, kiu permesus al la popolo konservi la fruktojn de sia jarcenta batalo.

Estas pro tio, ke ni ne neos la potencon de pluraj nuntempaj verkistoj, kiuj estas glorkovrataj: Rolland, Gorkij, Barbusse, Hamsun, Panait Istrăiti, Wells, Upton Sinclair ktp., sed ni diras, ke tiuj homoj estas hieraŭaj. Popolo alvokas ion alian, ĉar ĝi aliĝis. Hieraŭ Gorkij, Hamsun taŭgis, ĉar la proletariaro ne konsciis pri sia mizerego, necesis kriegi ĝin.

Sed tempo pasis. La jaro 1914 alvenis kun Barbusse kaj aliaj. Tiuspecaj verkistoj estis necesaj por malbenegi la militon... La milito de la landoj estas finita... Tiuj literaturistoj plenumis sian taskon; ili ne povas adaptiĝi je la nova situacio. La terurega vizio restas influanta ilin, kaj sentina malĝojemo vivetas en ili: Ne plu estas tiuj homoj, kiuj devas ekkrii "Al la batalo!" Ili jam estas kontuzitaj. Estas karno nova, juneca, kiun la batalo petas...

En pluraj naciaj literaturoj tiu irado, antaŭanta la okazontaĵojn, povas esti rimarkita. Se ni legus ekzemple la verkistojn de la lasta jarcento en la belgia literaturo, ni devus legi *Conscience*'on. Flandrio ĉe li estas bela lando, bona lando, bravaj loĝantoj, belaj fraŭlinoj, fortikaj junuloj, ĉio kun koloroj gajaj kaj trajtoj grasaj. Oni kredus ke la reganto de Flandrio estas Pan.

Antaŭen. — Legu *De Coster*'on. Ĉi tiu estas anoncanto, oni sentas (malgraŭ ke liaj temoj estas antaŭaj) la batadon de la ribelo ĉiupaĝe. La koloroj ialoke perdas jam sian helecon, estas jam malĝojemo.

Antaŭen. — *Lemonnier*. Ĉi tie estas literaturo de vojturno (de la speco nunmomenta). Estas paĝoj, kiuj alvokas revolucion, aliaj malamigas la burĝojn ("La Fino de l' Burĝoj"), sed estas paĝoj sengravaj en la verkaro de *Lemonnier*, tute kiel sengravaj estas la jaroj mem (1800—1890).

Antaŭen. — *Eekhoud*. — *Eekhoud*, kiel *De Coster*, estas verkisto anoncanta. En 1880 li verkas "Servokapabla"¹. Hodiaŭ ni legas tiun verkon, kaj ŝajnas al ni ke tiu verko estas

¹ Tiu verko estas tradukita esperantlingven kaj eldonita ĉe Hirt & Sohn, Leipzig.

verkita en 1928. *Eekhoud* kiel vera geniulo skribis por tiuj, kiuj estas kaj iras kaj ne por tiuj kiuj iomete estas kaj estis.

Poste aperas *Broodcoorens*. "La Ruĝa Sango de l' Flandroj"¹ estas io nova. Li skribas en la antaŭparolo:

"Ha! Tute mi malŝatas la tumultbruegon de la koleroj, la stultajn sarkasmojn aŭ la klukadon de malestima indulgo, kaŭzita de maljuneco, kiujn tia aserto estigos. Malgravas la krietoj kaj la ridetoj de miaj Tersitoj! Kion mi donas al vi — ĝi ne estas tio, kion lernigis aŭ decidigis min la lernejo, tiu fabrikejo de laŭmezuraj duonkleruloj, tiu abomeninda burĝa konformismo, la neceseco de bando aŭ de klano. Estas mia karno kaj mia sango, estas miaj larmoj kaj febroj, estas mia vivanta homsincereco, kiun mi donas al vi interŝanĝe kontraŭ tio, kion vi donas al mi, kiel la arbo fordonas sian frukton."

Li ne plu volas fieri kiel siaj antaŭuloj skribi grave pri Flandrio. Sed li parolas pri la Malklereco, pri la Malriĉeco kaj la Drinkemo de la popolo flandria... Sed li ne pasive skribas: li alvokas novan sociordon, kiun li sentus baldaŭ:

"Societo formiĝas, bazita sur aliaj leĝoj ol tiuj regantaj en la nuna burĝa sistemaĉo."

Lia lasta verko, kiu ne trovis eldoniston antaŭ lia morto. "Boule Carcasse"¹ anoncas novan epokon. Ĝi tamen estas verkata meze de la sango, en 1916. La herooj estas flandra fraŭlino kaj germana soldato, kiuj sin amas malgraŭ la okazintaĵoj. La konkludo de tiu verko, estas la Venko de la Vivo. Cetere la majstro skribis en la antaŭparolo:

"Tamen necesas vidi. Al nenio utilas erarvojiĝi en la multaj vojetoj de la penso. Necesas por la estonteco homoj agantaj, kreantoj de energio kaj novaj sintezoj..."

"La tombejoj etendas sur ni ombron nemezureblan kaj mortigan. Ĝi devas malvastiĝi.

Ni rifuzas treniĝi plilonge laŭ la gesto minacanta de l' mortoj. Ĉar necesas vivi, ni bezonas esperon. La espero estas la kondiĉo de la vivo.

"Ni salutas la Vivon, kiu venas, sentima kaj liberema, sovaĝa kaj instinkta, pli forta ol la memoro."

Jen almenaŭ verkisto, kiu ne skribis por siaepokuloj (militantoj), sed por ni. Jen majstro!

Kelkaj aliaj verkistoj venas moduli la sekvantan epokon, sed neniu eksterordinara. "Grandaj" verkistoj, sed kiuj verkas (eble tute bele) kiel siaj antaŭuloj. Bela lingvo, bela temo. Sed temo mortanta... Ili skribas por skribi... Kiom da tiuj verkistoj en ĉiulingvaj literaturoj! Kaj la unua devo de literaturisto estas tamen jena: "Alporti ion novan, iun ideon."

¹ Aperis fragmento en "S.R.", aprilo-majo 1924.

² Aperis fragmento en "S.R." aŭgusto-septembro 1924.

Hodiaŭ kelkaj provoj, sed timemaj. Sola estas interesa: Jean T o u s s e u l. Multaj el niaj legantaj konas "La Morto de Blanjo"¹. Al ni ŝajnas, ke estas paŝo. Tousseul estis ion dironta. Li montris laboriston ŝatanta alkoholon, subite ribeliĝanta kontraŭ la alkoholo, ĉar li konsciis ke la alkoholo blindigis kaj malfeliĉigis lin. Z o l a montris al ni laboristojn stultigitoj de la alkoholo. ("Germinal", "La Drinkejaĉo"².) La laboristo hodiaŭa komencis la batalon kontraŭ la alkoholo; la literaturo devas montri la fakton realigitan kaj konsekvencojn. La realismo estis kaj mortas; por la batalo de la proletariaro, literaturo "romantike proleteca" ŝajnas esti oportuna.

Necesas glorkanti la virtojn de la popolo anstataŭ "detale montri ĝiajn malvirtojn". Tio ne signifas forigi la malvirtojn, sed plivastigi la virtojn, ke ili konduku la proletaron al la finaj batalo kaj venko. La kredo revolucia, la frateca interhelpo estas du gvidiloj kiujn ni uzu.

La popolo posedas tiujn virtojn. La kredo revolucia kondukis Rusion al la liberigo, la kredo revolucia kapablis venki la malamikojn de la proleta Rusio. La frateca interhelpo estis pruvita, kiam okazis la malsatego en Sovetio. La proletaro ĉiulanda sendis sian parton por siaj fratoj malsatantaj.

Ĉu tio ne estas sentoj same potencaj por animigi romanon, kiel priskribo realista de la mizerega vivo de l' popolo?

Devas naskiĝi nova literaturo hodiaŭ ĉar morgaŭ ekestos nova epoko.

Se la regado de l' proletaro ŝajnas ankoraŭ malproksima; la literaturisto proleteca devas diri ke ĝi estas baldaŭa. Li devas antaŭenpuŝi kaj ne heziti. Li devas naski sentojn pozitivajn kaj ne negativajn. Cetere, ĉu oni devas atendi la finfinon de batalo, por kuraĝigi batalanton? Kaj hodiaŭ la proletaro bezonas bonan parolon. En ĉiu laborista koro, estas jam eklumo. La literaturisto devas intensigi tiun eklumon, kaj tiu eklumo fariĝu brulego, kie la civilizo kaj mondo nuna pereu por lasi lokon al tio, kion ĉiu proleto antaŭsentas...

Kaj la verkisto, kiu tiel sentos kaj kies plumo estus majstra, estos la genulo atendita de la morgaŭa revolucio.

¹ "La Morto de Blanjo" eldonita de SAT (1925).

² Tio kio okazas en la Belgia literaturo, certe pli-malpli okazas en la aliaj literaturoj. Mi prenis mian ekzemplon, ĉar kompreneble konante pli-profunde la ĉi tieajn verkistojn, mi povis paroli pli certe pri ili.

HISTORIO DE LA MONDOLINGVO (TRI JARCENTOJ DA SERĈADO)

ERNESTO DREZEN

El la rusa lingvo tradukis N. HOHLOV. Ĝenerale redaktis N. NEKRASOV

(5-a daŭrigo)

La internacia lingvista societo (1856—1858) Kiel montrilo, atestanta la kreskon de atento al la ideo de universala lingvo, estis tiu fakto, ke la fondita en la j. 1856, en Francio, Internacia lingvista societo, elektis komitaton el 23 personoj, al kiu ĝi komisiis prilabori la projekton de aprioria universala lingvo. La unua raporto al la societo pri universala lingvo estis farita en ĝi la 3-an de julio de j. 1856. Vere, el tiuj klopodoj rezultis nenio, ĉar la lingvista societo de la unua momento akceptis malveran vidpunkton subteni la filozofiajn sistemojn, kaj la artikoloj — raportoj de Kasimir Henricy en "Tribune de Linguistes"¹ en la j. 1858, enhavantaj resuman raporton de la komitato, estis la lasta resonado de tiu ĉi entrepreno. Sed eĉ la fondo mem de la ĵurnalo estis en certa grado tre ekzempla. La lingvista societo intencis pere de tiu ĉi ĵurnalo "disvastigi inter la homoj la ideon de universala lingvo, kies bezono komencis ĉie esti sentata; priesplori la bazojn de tiu ĉi lingvo, grupigi ĝiajn elementojn kaj prepari la vojojn por ĝia firmigo".

La komitato, formita de la societo, formulis la postulojn, prezentatajn por universala lingvo. Ĝi unuvoĉe akceptis, ke "tiu ĉi lingvo devas posedi sciencan karakteron kaj samtempe esti klara, simpla, facila, racia, logika, filozofia, riĉa, eŭfonia kaj elasta, kapabla por la plua evoluo".

Estis evidente, ke neniu el la antikvaj kaj modernaj lingvoj posedas samtempe ĉiujn tiujn kvalitojn kaj kontentigas ĉiujn tiujn kondiĉojn. Pro tio — la mortintaj kaj naturaj lingvoj rezulte estis unuvoĉe rekonitaj kiel maltaŭgaj por plenumi la rolon de universala lingvo. Post tio la komitato transiris al esploro de la problemo, ĉu ne estus eble akcepti iun el la plej disvastigitaj kulturaj vivantaj lingvoj, ĝin pliboniginte, riĉiginte kaj farinte en ĝi konformajn ŝanĝojn. Tia vidpunkto havis kelkajn adeptojn, sed la komitato ĝenerale venis al la konkludo, ke tiaspeca vidpunkto

¹ "Tribune de Linguistes", Paris, 1858, 1-re année, p. p. 17—39, 65—105, 129—169.

havas nenian valoron, ĉar “la lingvo, tiamaniere perfektigita, fariĝus nerekonebla kaj kune kun tio, restus malracia, nelogika, arbitra kaj malfacila”.

Restis fari elekton inter la sistemoj de lingvo aposteriora, konsistanta el partoj kaj fragmentoj, radikoj kaj sonimitaj vortoj, prezentaj el diversaj mortintaj kaj vivantaj lingvoj, kaj de lingvo apriora, t. e. konstruita el novaj elementoj. La komitato akceptis la decidon, ke ĉiuj sistemoj aposterioraj estas “malbonaj, ĉar la naturaj lingvoj konformiĝas ne al la nuna stato de sciencoj, sed al primitiva kaj embria stato de la civilizacio”.

La komitato voĉdonis “por la kreo de nova apriora lingvo. Tiu racia lingvo devis esti nomenklatur, samsenca al la universala klasifika sistemo, t. e. — esti lingvo filozofia”. Poste la komitato submetis al kritiko ĉiujn al ĝi konatajn sistemojn de artefarita lingvo. Ĝi esploris la projektojn de Dalgarno kaj Wilkins, la “ridindan projekton de enciklopedio” (Faiguët de Villeneuve), kiu estis laŭ ĝia opinio nur “komika kripligo de la franca lingvo”; “la unuan seriozan kaj praktikan projekton” de Delormel, la “tute konformajn al la principoj de universala lingvo” pazigrafiojn de Maimieux kaj Hourwitz; projekton de Le Mesl — “la plej bonan teorion de la lingvo, el la publikigitaj ĝis nun, tute konforman al la baztezoj de la komitato”; la projekton de Vidal — “kuraĝan plagiaton de la pazigrafia sistemo de Maimieux” kaj projektojn de kelkaj aliaj aŭtoroj.

La projektoj, prezentitaj al la Lingv-ista Societo La komitato esploris ankaŭ kelkajn proponojn de siaj propraj membroj. Ĝi donis kategorian nean verdikton por la vidpunkto de Letellier el Amiens, kiu opiniis ke la primitiva lingvo estis lingvo kelta kaj tial pretendis trovi la vortsencon per la disigo de koncerna vorto je literoj. Ekzemple: chat (kato) — besto ĉarma kaj amuza, rat (rato) — besto malgracia kaj grincanta. La komitato je la dua fojo donis kontraŭan opinion pri la opinio de sia membro Vaillant el Bukareŝto, kiu pensis, ke “universala lingvo ekzistas, ke oni devas nur elpreni ĝin el la internaciaj elementoj kaj radikoj de la ekzistantaj lingvoj”, t. e. pri la opinio, kiu estis esence kontraŭa al la baza direkto de la komitato. La saman verdikton malĝuis iu Gagne por sia aposteriora sistemo “Monopanglotte”.

La lastaj projektoj, esploritaj de la komitato, estis tiuj de Letellier el Caen kaj de Sotos-Ochando. La dua ricevis la preferan opinion, ĉar ĝi “konformiĝas al la ideoj de Le Mesl kaj de la komitato kaj superas ĉiujn aliajn projektojn”. Tial, en

¹ P. Stojan opinias la aperjaron de la sistemo de Gagne — 1843.

atendado de io pli bona, la komitato decidis labori, akcelante “ĝian plibonigon, popularigon kaj agnoskon”.

El raportoj de la komitato vidiĝas, ke ĝi intencis krei tian lingvon, kiu — laŭ la vortoj de Sotos-Ochando — donus al ĉiuj ĝin lernantaj samtempe bone analizitajn sciojn.

Ch. Renouvier (1855) Malgraŭ ĉio, la estontaj vojoj de la evoluo de universala lingvo iom post iom pliklariĝis. Samtempe al la laboroj de la komitato de la Lingvistica societo kaj eĉ antaŭ ĉi tiuj laboroj, donis sian opinion pri la problemo de universala lingvo konata franca filozofo Charles Renouvier¹.

Renouvier klare antaŭperceptis la vojojn de la plua krelaboro por universala lingvo: “la lingvo universala devas esti filozofia laŭ sia programo, empiria laŭ sia vortaro, t. e. ĝia vortaro devas esti prenita el la lingvoj vivantaj”. Per tiuj kelkaj vortoj Charles Renouvier signalis la bazajn vojmarkojn por la pluj esploroj kaj aspiroj pri la universala lingvo.

G. Edmonds (1856) Post li George Edmonds en la jaro 1856 en Londono, eldonis sian skizon de universalaj alfabeto kaj gramatiko de lingvo, bazita sur klasifiko de ideoj².

H. Parrat (1858) Alia projekto de “simpligita lingvo” estis publikigita en la j. 1858 de H. Parrat³.

F. Drojat (1857) La sistemo de universala alfabeto de Drojat estis eldonita en la j. 1857 sub titolo “Origina ideala alfabeto de ĉiuj lingvoj de la mondo”⁴.

De Rudelle (1858) En la j. 1858 Lucien de Rudelle publikigas sian novan skizon de aposteriora lingvo “Pantos-Dimou-Glossa”, konstruita sur la bazo de la lingvoj latina, romanaj kaj greka⁵.

Simpla, racie kunmetita gramatiko estis sendube granda pluso de tiu ĉi lingvo. En multaj detaloj ĝiaj formoj estas similaj al la

¹ Ch. Renouvier, “La revue philosophique et religieuse”, Paris, vol. II, pĝ. 56—85 (Aŭg 1855).

² George Edmonds, “A universal alphabet, grammar and language, comprising a scientific classification of the radical elements of discourse”, 1856.

³ H. J. F. Parrat, “Langue simplifiée”, Porrentruy, 1858.

⁴ François Drojat, “La maitresse clef de la tour de Babel. Alphabet primordial, phonétique, graphique, idéal de toutes les langues du globe”, 1857.

⁵ Lucien de Rudelle, “Pantos dimou-glossa, grammaire primitive d’une langue commune”, Paris, 1858.

samaj gramatikaj formoj de la poste aperintaj aposterioriaj projektoj. Rilate la vortaron de tiu ĉi lingvo, estas rimarkinde, ke pro la alfabeto malsimila al la normala latina alfabeto, la apartaj vortoj akiris kadukan kaj malfacile rekoneblan aspekton, ekz.: akvo (latine: aqua) — ako, kvalito (france: qualité) — kalitato. Pri la ekstera aspekto de la lingvo de de Rudelle oni povas juĝi laŭ la citita de la aŭtoro traduko de la unua frazo el "Tele-mako" (de Phenelon): "Potére ni konsolar dsam Kalipsoa dol eksito did Ylise."

Gablentz (1859—1860) En la jaroj 1859—1860 aperis "Gavlensografio" de Gablentz, transformita de li je gavlensolalio, t. e. je lingvo parola¹. Ĝia vortaro kaj ankaŭ la gramatikaj elementoj konsistas precipe el unusilabaj sonoj. Aparta alfabeto kaj ŝlosilo de la lingvo, kiu estis prilaborita por 33 lingvoj, devis servi por tradukoj en la lingvon de Gablentz kaj same por tradukoj el ĝi. La elpenaĵo de Gablentz montras certan komprenon pri la spirito de la lingvistiko, ĝi estas profunde pripensita, sed malvera aprioria prilaboro ne donis al la gavlensografio eblecon famigi kaj enhistoriigi per siaj sukcesoj la nomon de ĝia aŭtoro.

Mojsije Paic (1859) En la j. 1859 M. Paic, el Zemun (Kroatio), eldonis sian ciferan pazigrafion kaj kune kun tio sistemon de sona lingvo². En tiu ĉi sistemo estis uzitaj senescepte nombroj. La nombroj de 1 ĝis 999 signifis la gramatikajn formojn, kaj la numeroj pli grandaj ol 1000 — pazigrafiajn signojn por ideoj kaj konceptoj.

La kunigataj ideoj estis signitaj per la signoj de pluso aŭ minuso, ekz.: 3243 signifis aĉeto-vendon, 3243 + 10 — aĉetanton, 3243 + 101 — aĉetantojn ktp. El sia pazigrafio M. Paic formis paroleblan lingvon tiamaniere ke li anstataŭ la ciferoj metis literojn kaj anstataŭ la plus-minus-signoj — literojn *m* aŭ *n*, ekz.: 3243 + 10 — aĉetanto — fegimano, 3243 + 20 — aĉetantino — fegimeno ktp. Estante facila laŭ la strukturo de sia gramatiko, tiu ĉi sistemo, simile al ĉiuj aliaj sistemoj de ciferaj pazigrafioj, posedis nekorekteblajn mankojn pro la unuformeco kaj malfacila memorebleco de siaj vortoj.

¹ Gablentz, "Sprachwissenschaftliche Fragmente: 1 Deutscher Schlüssel zur Gavlenographie und Gavlensophonie oder Gavlensolalie", Leipzig, 1859—1860.

² Moses Paic, "Pasigraphie mittelst arabischer Zahlenzeichen", Semlin (Zemun), 1859.

La sama: "System einer Universalsprache", Wien, 1864.

Sunderwall (1862) Al la sama tempo rilatas la pazigrafia sistemo de Sunderwall el Svedio, kiun citas Einstein. Pli ĝuste la aperjaron de tiu ĉi sistemo montras Bollack, datumante ĝin per la j. 1862 kaj P. Stojan, datumante per la j. j. 1860 kaj 1872. Ĝiaj detaloj ĉe ni mankas.

D-ro Verdi (1859) Oni devas citi ankoraŭ unu projekton de cifera lingvo de D-ro Verdi¹, en kiu, simile al la sistemo de Paic, la respektivaj ciferesprimoj estis transponeblaj je lingvo sona.

A. Grimm (1860) Okaza, tamen tre valora laŭ sia profunda pripensiteco estas la rilatanta al la sama tempo skizo de la programo por universala lingvo, farita de rusa diplomato kaj scienculo Aŭgusto Grimm.

La ideoj de Grimm estas al ni konataj ne laŭ liaj verkoj, sed laŭ unu lia letero el Konstantinoplo, datita la 10-an de januaro 1860. La valoro de tiuj ideoj, restintaj nekonataj al la plimulto de la samtempuloj kaj aspirantoj de l'universala lingvo, sin trovas en la escepta ekzakteco, montrita en la starigo de tiuj principoj, kiuj devus esti konsideritaj ĉe la konstruo de artefarita universala lingvo.

Sed Grimm ne povis pensleviĝi ĝis la kompreno de la natura esenco de internacia aposterioria lingvo. Liaj ideoj estas ideoj por lingvo de miksita tipo, simila al la lingvoj naciaj, konstruita sur la bazo de latina lingvo, sed kun apriorie racionaligita vortaro kaj gramatiko.

En la sekvinta tempoperiodo laŭ tiuj ideoj estis konstruataj lingvoj: volapük kaj aliaj al ĝi similaj lingvoj.

S. P. Andrews (1862) En la j. 1862 la artikoloj de S. P. Andrews kaj de E. B. Freeland, dediĉitaj al la problemo de internacia lingvo estis publikigitaj en Ameriko, en novjorka ĵurnalo "Continental Monthly"². Troviĝas informoj, laŭ kiuj S. Andrews eĉ prilaboris projekton de aparta lingvo "Alevato"³.

La fama itala matematikisto G. Bellavitis donis en la sama tempo traktaĵon pri la problemo de universala lingvo⁴.

¹ Dr. Verdi, "Essai sur une nouvelle numération parlée appliquée à un projet de langue universelle", Bordeaux, 1859.

² "Continental Monthly", New York, 1862, n-oj 5 kaj 6.

³ "Rivista della Lingua Internazionale", 1909, n-oj 4 kaj 5.

⁴ G. Bellavitis, "Pensieri sopra una lingua universale esu alcuni argomenti analoghi", en "Mémorie del istituto", Veneto, 1862.

S. Ivičević (1862) En la sama jaro 1862 Stijepan Ivičević **De Lauture (1862)** en Wien eldonas sian sistemon de pangrafio¹ kaj de Lauture en Parizo hipotetikan (hipoteze bazitan) gramatikon de aprioria analitika lingvo².

Manuskriptaj projektoj (1850—1860) P. E. Stojan citas ankoraŭ kelkajn aliajn, nepublikigitajn projektojn, kiuj restas al ni nekonaĵoj kaj kiuj estis verŝajne ligitaj al la laboroj de la Lingvistica societo, nome tiuj de: **Gautier** — 1852, **Deschaux** — 1858 kaj **Silbermann** — 1858 el "Collège de France". La sama P. Stojan citas ankoraŭ iun "mediuman" lingvon, aperintan ĉirkaŭ la j. 1860.

S. de Mas (1863) Sinibaldo de Mas, hispana scienculo kaj diplomato, publikigis en la j. 1863 sian sistemon de ideale harmonia pazigrafio el 2600 signoj, laŭ siaj formoj rememorigantaj la muziknotojn³.

Krom la bazaj signoj, esprimantaj la ideojn, de Mas utilis apartajn aldonajn signojn, kiuj estis skribataj sub la ĉefaj signoj kaj kiuj difinis la koncernajn gramatikajn formojn: genron, nombron, personon, tempon, modon ktp. La pozicio de la signoj sur tiu aŭ alia nivelo difinis la ideojn de: substantivo, adjektivo, verbo ktp. Entute, kiel diras Max Müller⁴, de Mas faris pluan prilaboron de la ideoj de Wilkins, sed en sia laboro de Mas firme kontraŭis la penson pri la kreo de universala parolebla lingvo. "Ideografio estas arto skribi per signoj, esprimantaj ideojn, sed ne sonojn de iu lingvo" — tiel li difinas la destinton de sia lingvo. La libro de de Mas estis samtempe publikigita en Londono, Parizo kaj Leipzig. Sed la tuta praktika apliko de la sistemo restis ĉe sola traduko de la unuaj 150 versoj de "Eneido", farita de la aŭtoro mem.

Max Müller (1864) Juna, sed jam famiĝanta, angla scienculo kaj filologo Max Müller en Oxford, en siaj "Novaj lecionoj de lingvistiko" en la j. 1864 dediĉas al artefarita lingvo tre simpatiantajn kaj konvinkajn paĝojn. D-ro Albert Wild donas

¹ Stefano Ivičević, "Pangraphia ovvero scrittura universale arte nuova cosmopolitica", Wien, 1862.

² De Lauture, "Grammaire du télégraphe, hypothèse d'une langue analytique", Paris, 1862.

³ Sinibaldo de Mas, "L'idéographie". Mémoire sur la possibilité et la facilité de former une écriture générale etc., Paris, 1863.

⁴ Max Müller, "Vorlesungen über Wissenschaft der Sprache", II. Serie, Leipzig, 1886. Zweite Vorlesung "Sprache und Vernunft" (S. 38—87).

en la sama j. 1864, sur la paĝoj de unu ĵurnalo de München tre detalan historion de la pazigrafiaj sistemoj¹.

La internacia lumtura signalsistemo (1865) En la j. 1865 F. Julien en Parizo faris proponon pri unueca sistemo de universala lumsignalado por lumturoj². Post kelka mallonga tempo, en iom ŝanĝita aspekto kaj mallongigita amplekso, lia propono fariĝas bazo de unu el la modernaj interkomunikiloj — pere de la internaciaj lumturaĵaj signalsimboloj. Ĝi estis siaspeca parta solvo de la problemoj pri la universala neparola interkomunikila metodo, destinita por uzado en speciala fako. Analogiaj metodoj de signalado, kiel de la luma, tiel same de la sona, estis konataj eĉ al sovaĝuloj. Max Büchner en sia libro pri Kameruno rakontas, ekzemple, pri la ekzisto ĉe la negroj en Dualla de iu speciala "tambura" lingvo, per kiu en la virgaj arbaroj je distanco de multaj kilometroj oni interkomunikas diversajn informojn³.

J. Roux, J. Hunkele, A. Caumont (1865—1867) Poste, J. Roux en la j. 1865 publikigas sian sistemon de universalaj skribosignoj⁴. Similan projekton aperigas en la j. 1866 J. Hunkele el Paderborn⁵ kaj A. Caumont en la j. 1867 kun ties projekto de cifera klasifiko de ideoj sin returnas al la analogiaj pensoj de Leibnitz⁶.

Pirro (1868) Inter tiu nombro de apartaj aprioriaj kaj pazigrafiaj projektoj superiĝas la aposteriora projekto de Pirro⁷. La ĉefaj tezoj, kiuj estas ligitaj kun la bazo de la konstruataj aposterioriaj sistemoj, estis donitaj de la aŭtoro kun escepta klareco: "Ni akceptas neniun konatan lingvon, aŭ pli vere, ni akceptas ilin ĉiujn; ĉar ni elektas el ĉiu lingvo la vortojn plej konatajn kaj nepre tiujn kies elparolo postulas la plej malmultan penadon... lingvo latina donas la plejmulton da tiaj vortoj... la alfabeto estis farita el la sonoj komunaj al ĉiuj popoloj". Simplaj gramatikoj kaj vortaro, kompletigita per la vortoj el lingvoj franca, itala, angla, germana kaj hispana, finformigas ĉi tiun, perfektan por sia tempo, sistemon. Kiel ĝia ilustra ekzemplo povas servi jena komenco de letero:

¹ A. Wild, "Ueber Geschichte der Pasigraphie" en "Chronik der Gegenwart", München, 1864.

² Felix Julien, "Essai de langue universelle", Paris, 1865.

³ "Esperantisto", Nürnberg, 1892, n-o 8, p. 118.

⁴ J. T. Roux, "Essai sur une langue universelle, un moyen proposé à tous les peuples de correspondre entre eux par des signes écrits", 1865.

⁵ Joseph Hunkele, "Scriptura universalis. Versuch einer kurzen Gemeinschaft für alle Völker", Paderborn, 1866.

⁶ Aldrick Caumont, "Langue universelle de l'humanité ou télégraphie parlée", Le Havre, 1867.

⁷ Pirro, "Universal Sprache (Universalglot) mit Wörterbuch", Paris, 1868.

“Men senior. I sende evos un gramatik e un verb-bibel de un nuvo glot nomed universal-glott...”

La lernolibroj de la lingvo estis eldonitaj en germana, franca kaj angla lingvoj, sed tiutempe ankoraŭ ne batis la horo por la triumfo de la ideoj de aposteriora lingvo.

A. Bachmair (1852—1868) Ellaborita jam en la j. 1852 projekto de pazigrafio de granda komercisto el München, A. Bachmair (en la germana enciklopedia vortaro de Brockhaus li estas erare nomita Bachmann) en tiu tempo akiras ioman sukceson¹. Bachmair utiligis por sia sistemo 10 cifersignojn, kiuj estas konataj al la tuta mondo, sed kiuj estas skribataj aŭ kiel en eŭropaj lingvoj — de maldekstre dekstren, aŭ kiel ĉe la araboj — de dekstre maldekstren, aŭ kiel ĉe la ĉinoj — de supre malsupren. Ili estas facile skribeblaj, telegrafeblaj kaj preseblaj. Bachmair esprimis ĉiun ideon per nombro. Difinitan artikolon li ne uzas. Por la nedifinita servas la cifero 1. La multenombro li montris per substreko de la nombro-ideo. La gradojn de l' komparo li signis per du punktoj metataj super la nombro-ideo kaj la numeralojn vicajn — per la punktoj, metataj malsupre. La verbo estas uzata nur en infinitivo. La estonta tempo estis montrata per streko farita super la nombro, la pasinta — per trastreko de la nombro-ideo ktp. Por enkonduko de tiu ĉi tre facila pazigrafia sistemo en la vivon, formiĝis en München “Centra societo de pazigrafiistoj”. Ĝin partoprenis tiaj unuaklasaj scienculoj, kiel posedanta 34 lingvojn profesoro Richter, fama egiptologo Laut, D-ro Albert Wild kaj aliaj. Gablentz, Sinibaldo de Mas, M. Paič estis honoraj anoj de la societo. Kelkaj registaroj ek-interesiĝis pri tiuj laboroj. La vortaroj de la nova pazigrafio estis preparataj por preso samtempe en 18 lingvoj, sed la monrimedo ne montris sufiĉajn kaj la entrepreno de Bachmair fiaskis. La lernolibroj kaj vortaroj de la nova pazigrafio aperis nur en la j. 1868 kaj nur en la lingvoj franca, germana kaj angla².

A. Schmitt (1866) Anton Schmitt jam en la j. 1835 komencis la prilaboron de projekto de “dinamika pazigrafio”, celinta per la figurigo de karakteraj gestoj kaj movoj transdoni diversajn ideojn. Sed apenaŭ en la j. 1866 tiu ĉi libro de Schmitt estis publikigita³. Interalie en tiu ĉi libro ni trovas

¹ L. Einstein, “Geschichte der weltsprachlichen Versuche von Leibnitz bis auf die Gegenwart”, “Bayerische Lehrer-Zeitung”, Nürnberg, 1885.

² Bachmair, “Pasigraphisches Wörterbuch Deutsch—Englisch—Französisch”, Augsburg, 1868.

De la sama: “Pasigraphical Dictionary and grammar”, Augsburg, 1870.

³ A. Schmitt, “Einfacher Plan zur Systematisierung verschiedener Spezial-Alphabete, eines Universal-Alphabets und einer Pasigraphie”, Mainz, 1866.

informojn pri tio, ke estis kunvokitaj du internaciaj kongresoj de pazigrafiistoj (vidu “Augsburger Allgemeine Zeitung”, n-o 33 de 25. febr. 1854), kiujn partoprenis Max Müller, profes. Owen, Lepsius kaj aliaj, kaj kiuj kondukis inter si viglajn diskutojn pri la bazaj principoj de la konstruo de universala skriba lingvo.

Revuon de la ĝenerala evoluo de la pazigrafiaj ideoj ni trovas en raporto de Pojattina, eldonita en la j. 1870 en Wien¹.

A. Boudevillain (1867) Estas menciinda ankoraŭ unu projekto de “universala internacia lingvo” de A. Boudevillain, verkita ĉirkaŭ la j. 1867².

A. de Vertus (1868) A. de Vertus, vicprezidanto de la historia kaj arkeologia societo en Château-Thierry, en la j. 1868 eldonas treege originalan projekton de “luna ideografio”. Ni konas nur la duan eldonon de tiu ĉi libro³. La unua luksa eldono, dediĉita al la klerigministro de Francio, ne cirkulis en la ĝenerala vendado. La aŭtoro celas pruvi, ke preskaŭ ĉiuj ideoj kaj konceptoj en ĉiuj ekzistantaj lingvoj originis el elementaj impresoj, ricevataj de la luna disko, ĝia formo, aspekto, koloro ktp. Ĝenerale tio estas nur skizplano pri la kreo de lingvo, sed ne detale prilaborita projekto. La figuroj por la lunaj fazoj ☉ (novluno), ☽ (la unua kvarono), ☽ (plena luno), ☾ (la kvara kvarono), estas de li uzataj por transdono de apartaj ideoj kaj ankaŭ por la literoj kaj sonoj.

La mara signala Kodo (1871) En la j. 1871 en Francio estis presita, nun ĉie akceptita, la “Mara signala Kodo⁴”, kiu entenis en siaj diverskoloraj signalaroj faktan kaj tute ĝustaloke akomoditan sistemon de pazigrafio (ne filozofian, sed empirian), se ni konsideros ĝin ne kiel parolan, sed perokulan interkomprenilon.

La maraj signaloj havas por siaj ĉefaj elementoj: 1 — larĝan rubandflagon, 5 rubandflagojn, 12 kvarangulajn flagojn kaj unu specialan flagon — simbolon de la kodo, per kiu oni informas pri la komenco de signalado. Ĉiu el tiuj 19 flagoj diferencigas de la aliaj kiel per sia koloro, tiel ankaŭ per sia desegnaĵo kaj signifas (krom la lasta, la 19-a) unu el la konsonantoj de la latina alfabeto. La kombinaĵoj el 2, 3, 4 flagoj (entute ili nombras 78 642 kom-

¹ Pojattina, “Eine Vorlesung über die Pasigraphie, ihre Berechtigung, ihr Werth und ihre Zukunft”, Wien, 1870.

² Jurnal “Progreso”, Paris, 1910, vol. III, pĝ. 637.

³ A. de Vertus, “La langue primitive sur l'idéographie lunaire. Principes des idioms anciens et modernes”. Château-Thierry, 1868.

⁴ “Code international des signaux à l'usage des bâtiments de toutes nations”, Paris, 1871.

binaĵojn) formas apartajn vortojn aŭ kompletajn frazojn. La signaloj el 2, 3 aŭ 4 flagoj en sinsekva ordo montras la direkton de la ŝipo, urĝajn kaj gravajn sciigojn, gradojn de la longitudo kaj latitudo, geografiajn nomojn, ĝeneralajn frazojn kaj nomojn de la ŝipoj (malsamaj por diversaj nacioj). En okazo de bezono la flagojn anstataŭas kombinaĵoj el senkoloraj signoj (rubandflago kaj kvarangula figuro) aŭ diversmaniere dismetitaj lumoj de diversaj koloroj. Similspecaj signalkodoj ofte aperis pli frue en Britio (la unuaj en la j. j. 1818 kaj 1820 en Francio kaj Usono), sed nur la kodo de la j. 1871, unue akceptita de Britio kaj Francio, estis poste akceptita de ĉiuj aliaj regnoj, do fariĝis internacia.

Post la franca eldono de la kodo aperis ĝiaj eldonoj en aliaj lingvoj kaj baldaŭ sur ĉiu ŝipo troviĝis la vortaro de "universala mara lingvo".

Holmar (1871—1874) En la j. 1871 franclingve en urbo Gratz estis publikigita projekto de tutmonda lingvo de iu Holmar¹. En la j. 1874 verŝajne la sama libro estis reeldonita anglolingve en Londono².

C. Stewart (1874) C. Stewart en la j. 1874 publikigas sian lernolibron de cifera lingvo³. En la sama 1874 j. aperas tre serioza artikolo dediĉita al la problemo de universala lingvo, en la novaĵjorka "Internacia Revuo"⁴.

A. Staffler (1869) En la j. 1869 en Innsbruck A. F. Staffler eldonas libron dediĉatan al la problemo de la kreo de racia universala helpa lingvo⁵. La aŭtoro provizore donis kelkajn artikolojn, dediĉitajn al tiu ĉi projekto en diversaj periodaj publikigaĵoj. Kombinante 5 vokalojn kaj 20 konsonantojn, la aŭtoro ricevas 100 duliterajn silabojn por la esprimo de ĉefaj ideoj (la unua litero konsonanto, la dua — vokalo). Utiligante la matematikajn signojn: +, —, ×, :, la aŭtoro konstruas siajn vortaron kaj gramatikon. Kiel ekzemploj por tiu ĉi lingvo estas jenaj frazoj: "Sa om te Mandora?" (Ĉu vi komprenas la universalan lingvon?) kaj "Emi Nassa sehe oba bealla. Oizenda fazzo" — komenco de la preĝo "Patro nia".

¹ Holmar, "L'interprète universel ou langue pour toutes les nations de l'univers", Gratz, 1871.

² "New universal cipher language", London, 1874.

³ C. Stewart, "International Correspondance by means of numbers etc.", London, 1874.

⁴ Artikolo de P. G. Hammerton en "International Review", New York, 1874, vol. I, pĝ. 721.

⁵ Augustin Fr. Staffler, "Die Idee einer rationellen universal Dolmetscher-Sprache", 1869.

J. Dyer (1875—1906) Kune kun la cititaj de ni projektoj pazigrafiaj ne ĉesis aperi ankaŭ projektoj aprioriaj, parolaj. Unu el ili estis la "lingvo de lumo" de J. Dyer¹. Tiu ĉi projekto, laŭ la ideo de sia aŭtoro, devis esti "per si mem instrua". Por tiu celo en la lingvo devis esti farita logika klasifiko de ĉio ekzistanta, de ĉiuj konceptoj kaj ideoj, kaj ankaŭ sistema klasifiko de ĉiuj sonoj, fareblaj el la vokaloj kaj konsonantoj. Klasifiko de ideoj proponita de Dyer, posedas certan kvanton da spriteco, sed samtempe ankaŭ da komplikeco. Laŭ la penso de Dyer, simila logika lingvo povas tute ne havi gramatikon. Ĉiuj necesaj variaĵoj de la ideoj povas esti formeblaj el la vortaraj elementoj.

En la j. 1889 Dyer en Londono reeldonis reverkita parton de sia laboro. Post la morto de Dyer, en la j. 1903 liaj amikoj A. Gottschling kaj H. P. Lakeman komencis publikigi la restintajn neeldonitajn verkojn de Dyer kaj eĉ formis societon por prilaboro kaj propagando de la lingvo de Dyer ("Dyer-Lingva-Lucida Society").

La sciigoj de Juŝmanov, ke en la j. 1903 estis prilaborita (aŭ publikigita) de Dyer aparta sistemo de nova lingvo "Lingva Lucida"², estas verŝajne bazitaj per iu miskompreno.

Sertorio (1876) En la j. 1876 Sertorio presas projekton de filozofia sistemo de universala gramatiko³. En la j. 1888 la sama aŭtoro en broŝuro, eldonita en Porto Maurizio, ree sin turnas al sia projekto.

G. Ferrari (1877) Ferrari en la j. 1877 publikigas sian "Monoglottika", kritikan analizon de diversaj sistemoj de la lingvoperfektigo, de filozofiaj projektoj, de universala alfabeto kaj stenografio⁴.

Ni renkontas ĉe Ferrari citaĵojn ke jam en la j. 1871 en Modena li laboris pri ĝenerala problemo koncerne la starigon de universala lingvo.

D-ro J. Damm (1876) En la j. 1876 D-ro Damm en Leipzig presis sian lernolibron de praktika pazigrafio⁵. Kun partopreno de Hogner post unu jaro tiu ĉi projekto estis reeldonita en Kopenhago danlingve. Tio estis la unua okazo kiam la ideoj pri universala lingvo estis publikigitaj en lingvo de malgranda nacio.

¹ J. W. Dyer, "The Lingvalumina, or Language of Light", London, 1875.

² Gazeto "Mondo", Stockholm, 1926, n-o 2, pĝ. 47.


³ Sertorio, "Un esme filosofico della grammatica universale", Oneglia, 1876.

⁴ Gaetano Ferrari, "Monoglottika. Considerazioni storico, critico e filosofiche intorna alla di ricerca di una lingua universal". 2 ed. Modena, 1877.

⁵ D-ro J. Damm, "Praktische Pasigraphie oder die Kunst, mit allen Nationen korrespondieren zu können, ohne deren Sprache mächtig zu sein", Leipzig, 1876.

La sistemo de Damm (vidu ĝian skemon) posedas kompare tre malgrandan nombron da bazaj signoj, entute — 100. Sed ĉiu el 100 signoj de la unua vico, depende de la ĝin antaŭiranta cifero (de 1 ĝis 40) donas apartan diferencon ideon.

1-a vico de gramatikaj signoj (100):



2-a vico de gramatikaj signoj (7):



Tiamaniere, fakte sumiĝas nur $40 \times 100 = 4000$ bazaj ideografiaj signoj, konformaj al vortradikoj en niaj lingvoj.

En tiu rilato Damm postsekvas al Kircher, kiu similmaniere signis la vortojn kaj ideojn per kombinaĵoj el la romaj kaj arabaj ciferoj. Utiliginte la 7 signojn de la 2-a vico, oni povas fari el tiuj radikaj ideoj kaj konceptoj iliajn respektivajn logikajn kaj gramatikajn ŝanĝojn. Ĉiu el la signoj de la dua vico povas esti skribita super, sub, dekstre aŭ maldekstre de la ĉefa signo. Tiamaniere oni ricevas entute $4 \times 7 = 28$ ĉefajn gramatikajn formojn kaj variaĵojn.

Punkto, starigita maldekstre, supre, malsupre aŭ dekstre de la signo — signifas ŝanĝojn de la ĉefa ideo, kiuj estas konformaj al akuzativo, genitivo kaj ablativo. Horizontala streketo en la samaj lokoj signifas ŝanĝojn konformajn al: prefikso de difinita artikolo, substantivo, adjektivo, adverbo ktp.

En tiu rilato ni ree trovas multon analogian kun kelkaj aliaj pli fruaj pazigrafiaj sistemoj, ekz. tiu de Bachmaier.

F. Reimann (1877) En la enciklopedia vortaro de Larousse, el XIX jarcento¹, troviĝas informoj ke iu F. Reimann estis elpensinto de internacia etimologia lingvo (langue internationale étymologique). Liaj respektivaj artikoloj: "Langue brève, langue des nombres et la grammaire" estis presitaj en ĵurnalo "Courrier de l'Europe". La aŭtoro de la artikolo en la enciklopedia vortaro trovas sin devigita atentigi la publikon pri tiu ĉi "simpla, facila, mallonga kaj logika lingvo", sed vere nediskutebla el ĉiuj tiuj ecoj estas nur la mallongeco de tiu nova lingvo.

La alfabeto de tiu ĉi "simpla" lingvo konsistas el 42 literoj kaj 4 supersignoj. La gramatiko estas simpla kaj sen esceptoj, sed ne facile memorebla. Koncerne la sintakson la aŭtoro sin limigas per ĝeneralaj reguloj ke "la frazojn ĉiu konstruu tiel, kiel en sia propra lingvo". Tiu ĝenerala regulo neeviteble kaŭzus multajn miskomprenojn en la okazo se oni serioze ekuzus ĉi tiun lingvon.

Aparte karaktera estas transskribo de la nombroj entute koincidanta kun la ideoj de Leibnitz. La ciferoj en sinsekva ordo de 1 ĝis 9 estas signataj per konsonantoj: d, v, l, m, n, ktp., la klasoj per vokaloj: 1 — i, 10 — e, 100 — a, 1000 — o, 10 000 — u. Tiamaniere oni ricevas: 333 — laleli, 450 010 — muniade.

La plua prilaboro de tiu skizo, de tiu lingvoskemo ne estis farita. Nenie estis publikigita eĉ iu teksto en tiu ĉi lingvo.

A. Walter (1880) L. Einstein notas ankoraŭ proponon de A. Walter el Winterthur, kiu proponis sian apartan "sistemon por ĉifro kaj telegrafado", konsistantan el triopaj kombinaĵoj de ĉiuj literoj, komencante de la unua litero de la alfabeto (aaa) kaj finante per la lasta (zzz). Eble en telegrafado, pro apliko de tiu ĉi sistemo, oni havus sufiĉan (ĝis 40%) ekonomion, sed estas dube, ĉu tia sistemo povus havi pli vastan ĝeneralan praktikadon.

M. Glubokovskij (1880) Por fini la priskribon de la esplorata tempo-periodo, ni devas halti ĉe la unua presita projekto de rusa aŭtoro, kiu koncentrigis sian atenton por la problemo de universala lingvo. Tiu ĉi aŭtoro estis d-ro Matvej Nikanoroviĉ Glubokovskij². Kredeble li ne estis koninta la analogiajn fremdlingvajn verkojn kaj esplorojn. Almenaŭ en sia laboro li faras pri tio neniam indikojn. La aŭtoro projektas la ideon de kombinitaj filozofia pazigrafio kun sona filozofia scienca lingvo. En tiu rilato tamen prezentas grandan intereson la treege ekzakta kaj klara, oni povus diri — "marksana", pensmaniero de la aŭtoro.

¹ Larousse, "Grand Dictionnaire Universel", Paris, 1877, vol. XVI, p. 1035.

² "Vsemirno nauĉnyj jazyk, vozmoĝnostj i metod jego sozdanija." Izsledovanije M. N. Glubokovskago, Moskva, 1880.

“La nunaj lingvoj esprimas la mondpercepton de niaj antaŭuloj kaj tial ili donas al ni ideojn malnoviĝintajn, malĝustajn kaj iafoje eĉ sensencajn. La lingvo, kiu estas produktaĵo de siaspeca ‘mimetismo’ — posedas eblecon akomodigi al diversaj cirkonstancoj kaj konservi en si la postsignojn de tiuj cirkonstancoj...”

M. N. Glubokovskij ne opiniis sin kapabla memstare prilabori la tutan sistemon de la lingvo. Li skribas: “La vojo, kiun mi proponas por atingi ĉi tiun celon, estas kolektiva laboro de la pensuloj kaj scienculoj, unuvorte — de ĉiuj antaŭstarantaj homoj de nia tempo.” Koncerne la konstruon de la lingvo mem, Glubokovskij ne faris pli ol doni planan skemon por certaj principoj de la klasifiko kaj por ilustro prezentis en neplena prilaboro la klasifikojn por zoologio kaj botaniko.

Laŭ lia propono apartaj klasoj kaj specoj de la animala mondo povas esti figureblaj laŭ jena skemo: A — vertebrohavaj animaloj, B — senvertebraj, A¹ — klaso de la mamnutrantaj, A² — klaso de birdoj, A³ — amfibioj, A²₁ — flugantaj birdoj, — A²₂ — piedirantaj birdoj, A²₃ — naĝantaj birdoj, ktp.

Li skizas ankaŭ skemon por la derivado de la verbdevenaj substantivoj. Ekzemple, se cifero unu (1) antaŭ la litero signifas movon kaj cifero du (2) — sonadon, tiam 1 A² signifos — flugadon, 2 A²₁ 2/0 — grakadon (de: A²₁ 2/0 — korniko).

Tiaspeca filozofia pazigrafio devus doni eblecon, (en respektiva ŝanĝo de la pazigrafia signado per sona elparolo) formi paroleblan lingvon, ekz.: A = a (vertebrohava animalo), A² = am (birdo), A⁴ = an (fiŝo), A⁴ 2/2 = arjamjal (la unua variaĵo de orfiŝo) ktp.

Pluan prilaboron la projekto ne havis.

Ceteraj pazigrafistoj kaj aŭtoroj de sistemoj de universala lingvo en XIX. jarcento Krom la supre de ni cititaj projektoj, sendube aperis multaj aliaj, ne ĉiam fariĝintaj konataj post la limoj de sia lando kaj nin ne atingintaj. Tiel ekz.: H. Moser en sia libro¹ citas

la laborojn de Baumgarten, Juhle, Haseman (citita sub la jaro 1880) kaj de von Karl, kaj rilate la lastan diras ke lia projekto estas simila al pli malfrua, publikigita en la j. 1884, projekto de filozofia pazigrafio, proponita de S. Baranovskij. En la VIII. volumo de germana bibliografia vortaro (Allgemeines Bücher-Lexikon von W. Heinsius, VIII. Band, Leipzig, 1829, S. 408) ni trovis informojn ke iu A. O. Karl prilaboris vortaron de “prusa farmakopeo” kaj ankaŭ de historiaj, medicinaj kaj kemiaj esprimoj², sed pli detalajn informojn pri tiu ĉi verko ni

¹ Hans Moser, “Grundriß einer Geschichte der Weltsprache“, Berlin-Neuwied, 1888.

² Karl A. O., “Wörterbuch zu Preuß. Pharmakopöe, in welchem alle Wörter der Pharmakopöe, sowohl d. eigenthüml. Bedeutungen in Wissenschaftl. Kunstsprache aufgeführt sind als auch d. histor. medic. und chem. Ausdrücke angegeben sind“, Berlin, 1828.

ne sukcesis ricevi. Pri Juhle kaj Baumgarten ni ĝenerale ne estas informitaj.

P. Stojan informas¹ ke en la broŝuro de Giuseppe Castelli “Il Pregindizio di una lingua universale“ (1905, Roma, paĝo 19) estas dirite, ke la fama hungara geometro J. Bolyai, unu el la triopo: Lobaĉevskij — Bolyai — Riemann — fondintoj de la neeŭklida sistemo de geometrio, provis krei mondlingvon sur la bazo de sia gepatra lingvo hungara. Li eĉ preparis vortaron de tiu nova lingvo. La unua sciigo pri Bolyai, kiel mondlingvisto, venis verŝajne de germana matematikisto Stäckel, aŭtoro de studoj pri Neeŭklida geometrio, kiu, esplorinte la manuskriptojn de Bolyai, trovis inter ili la projekton de mondlingvo.

Ni povas nomi ankaŭ aliajn konatajn projektojn de hungaraj pazigrafistoj. Tiel, István Kovácsházi en 1877 verkis pazigrafian sistemon “Pantographia“. Móz Jokai en 1872 en sia “Romano de proksima jarcento“ esprimis ideon pri pazigrafio. Ankaŭ hungaro József Fazekas estis aŭtoro de projekto “Höm-
apar²“.

N. Juŝmanov³ krom la suprenomita, J. Bolyai, M. Jokai kaj I. Kovácsházi citas ankaŭ pazigrafiston J. Bobula, sed sen iuj detaloj.

Aliparte P. Stojan citas ankaŭ aŭtorojn de universala lingvo: Rechmann (1878) kaj F. Besnard (Asay sur mer, 1880).

Ni restas neinformitaj pri multaj aŭtoroj, cititaj de G. Ferrarari kaj laborintaj parte en la XVIII, parte en la XIX jarcentoj. Ĉi tiujn aŭtorojn ni eĉ ne citos, ĉar: 1. eĉ ne unu el ili eniris la zorge kunmetitajn en la j. 1889 listojn de prof. Kerckhoffs⁴, kaj 2. Ferrarari aldonis al la nomoj de la serĉantoj de universala lingvo stenografiistojn (ekz. Taylor, Vesin, Bertin), gramatikistojn teoriulojn de filozofia gramatiko (Loroth, du Marsais) ktp.

Krom la elpensintoj kaj aŭtoroj de la sistemoj de artefarita lingvo, multaj personoj, ofte gravaj sciencfakuloj publike diris sian opinion dum la XIX jarcento, precipe dum ties dua duono, subtenante la ideon de universala lingvo. Ernest Renan, Schopenhauer k. a. en siaj verkoj antaŭvidis la eblecon de artefarita universala lingvo kaj profetis por ĝi sukcesan estontecon.

Aparte lakone kaj ekzakte formulas ĉi tiun ĉiam firmiĝantan konscion pri la neceso kaj neevitebleco de la alveno de universala lingvo, la franca ĵurnalisto E. de Girardin (1806—1881): “La universala lingvo komencos per tio, ke ĝi estos lingvo helpa kaj finos per tio, ke ĝi estos lingvo lasta kaj sola.“

¹ “Heroldo de Esperanto“, Köln, n-o 50 (494), 14. 12. 1928, pĝ. 10.

² “Schola et Vita“, Milano, 1928, n-o 9—10, pĝ. 297.

³ “Mondo“, Stockholm, 1926, n-o 2, pĝ. 49.

⁴ Plofed Kerckhoffs, “Yelabuk pedipedelas“, Le Soudier, Paris, 1889.

La utopiistoj, Karl Marx kaj la II. Kongreso de la I. Internacio

Proksimiĝis la momento, kiam, trapasinte la diversajn etapojn de sia evoluo, la ideo de artefarita universala lingvo el la regiono de retorta eksperimentado devis esti elportota al la vasta areno de porsocia apliko. Kaj kredeble ne okaze ĉi tiu momento koincidiĝis kun la momento, kiam naskiĝis la amasa internacia movado, do kiam naskiĝis kaj estis kreita la laborista Internacio.

La unuaj pioniroj de la laborista movado, certe pensis pri internacia lingvo, sed ili havis nek tempon, nek neceson profunde esplori la problemon. Kaj tamen la universala lingvo, kiel ilo por tutmonda interkomunikiĝo de laboruloj, ŝajnis al ili senduba bono, al kiu oni devis celi.

Jam en multe pli frua epoko ĝeneralajn ideojn pri la problemo de racia lingvo diris Tomas More en sia "Utopio" (1516) kaj Doni Verras en la utopia "Historio de Severamboj" (1677)¹. A. Ś w i e s t o c h o w s k i eĉ atentigas ke la gramatiko kaj vortaro de la lingvo de severamboj, donataj de la aŭtoro, memorigas laŭ siaj sonoj esperanton. Same F o u r i e r kredis je la triumfo de la ideo de universala lingvo, kaj K a b e en sia "Vojaĝo tra Ikario" (1840), donis gramatikon kaj vortaron de "ikaria lingvo", rimarkinda laŭ sia simpleco kaj logikeco. Ankaŭ aliaj fantaziuloj-utopiistoj donis tiujn aŭ aliajn supozojn pri la demando de estonta racia lingvo. P. M a n t e g a z z a en sia romano "La 3000-a jaro", R o b i d a en la romano "Le Vingtième Siècle" (Paris, 1884) montras la bazojn por la lingvo de la estonteco. La sama temo pli aŭ malpli arbitre estas tuŝita de H. W e l l s kaj de aliaj aŭtoroj de la modernaj utopioj.

La fantaziuloj kaj revuloj povis eĉ provi solvi la problemon kaj solvi ĝin per unu hako. Sendube tute alia, pli serioza estis la rilato al tiu ĉi problemo de la gvidanto, teoriulo kaj praktikulo de la internacia laborista batalo, Karl Marx. Pri tiu punkto A. Tom² skribas:

"M a r x vivis en la epoko, kiam la monda ekonomio ne atingis ankoraŭ tiun evolugradon, por, kun evidenta neceso, elvoki la nepran bezonon de internacia lingvo. Tiam estis farataj nur multenombraj provoj (ĉiam sensukcesaj) krei iagrade artefaritan internacian lingvon. Tial ni neniel mirus pri la nea rilato de M a r x al tiu ĉi problemo. Tamen, evidentiĝas, ke tiel ne okazis, sed M a r x, laŭ la citaĵo el unu el liaj leteroj, ne montrante sian rilaton al la problemo de internacia lingvo (en tiu tempo oni parolis pri lingvo tutmonda), postulis de persono, kiu volus ĝin solvi, almenaŭ seriozan sciencan antaŭpreparon." (Daŭrigota.)

¹ A. Ś w i e s t o c h o w s k i, "Historio de utopioj", Rusa traduko el la pola, Moskva, 1910, pĝ. 50, 101, 158, 198, 397—398.

² Gazeto "Internacia lingvo", Moskva-Kazanĵ, 1926, n-o 13, pĝ. 2.

Atentu!

Jen la adresoj de la tri fak-redaktoroj, al kiuj oni bonvolu sendi la koncernan materialon:

FAKO LITERATURA

K-do *Nikolao Nekrasov*, 1-a Tverskaja Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo (Sovetio)

FAKO PEDAGOGIA

K-do *H. Stay*, 18 A Grand Avenue, Bournemouth, Hants. (Anglio)

FAKO SCIENC-TEKNIKA

K-do *Gregoro Demidjuk*, Degtjarnij per. 5, kv. 6, Moskvo 6 (Sovetio)

Tarifo de "La Nova Epoko"

(La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon)

Argentino, pes. 2 (3); Aŭstrio, ŝil. 4 (5); Belgio, belgo 3 (4); Brazilio, milr. 5 (7); Britio, ŝil. 3 (4); Bulgario, lev. 100 (150); Ĉeĥoslovakio, kr. 20 (25); Danio, kr. 3 (4); Estonio, kr. 2,50 (3); Finnlando, mk. 25 (30); Francio, fr. 15 (18); Germanio, mk. 3 (4); Hispanio, pes. 4 (5); Hungario, peng. 4 (5); Italio, lir. 15 (20); Japanio, jen. 2 (2,50); Jugoslavio, din. 40 (45); Latvio, lat. 3 (4); Litovio, lid. 6 (8); Nederlando, guld. 2 (2,50); Norvegio, kr. 3 (4); Polio, zlot. 5 (7); Portugalio, esk. 12 (15); Rumanio, lej. 120 (150); Sovetio, rubl. 1,50 (2); Svedio, kr. 3 (4); Svisio, fr. 4 (5); Usono, dol. 1 (1,50).

KOMPLETIGU VIAN ESPERANTAN BIBLIOTEKON

aĉetante la lastajn eldonaĵojn de SAT!

H. Zur Mühlen
FABELOJ
Kion rakontas la amikoj
de Peĉjo
Biblioteko de Sennaciulo
n-o 6
Prezo: 0,60 mk. g.

Akad. Fersman
**La Vojo al Scienco
de Estonto**
Biblioteko de Sennaciulo
n-o 7
Kun speciala antaŭparolo del'verk-
into por la esperanta eldono
Prezo: 0,60 mk. g.

E. Lanti
**LA LABORISTA
ESPERANTISMO**
40 paĝoj
La necesa instru-kleriga bro-
suro de la gvidanto de SAT
Prezo: 0,40 mk. g.

PROTOKOLARO
de l'8-a SAT-Kongreso
Göteborg, aŭg. 1928
*Kun aldono de la Program-
projekto de SAT kaj la
kontraŭ-argumentoj de la
Direkcio de SAT*
64 pĝ. Prezo: 0,50 mk. g.

N. Barthelmess
DIABLIDOJ
Rakonto por la Junularo
Kun titolbildo tutpaĝa
48 paĝoj
Prezo: 0,60 mk. g.

E. Miĥalski
PROLOGO
Originala versaĵaro
64 paĝoj
Kun titolbildo
Prezo: 0,70 mk. g.

Mendu ĉe

**Administrejo de SAT, Colmstr. 1
Leipzig O 27**